HUNGARA VIVO

1971 3 8.–Ft



DUM VIA VOJAĜO EN HUNGARIO

vizitu niajn movmaterial-staciojn
En la tuta lando ni estas kompleze
je via dispono.

EKSTRA SUPER BENZINO 98.
EKSTRABENZINO 92. NORMALA BENZINO 86.
OLEOJ „MULTI GRADEN"

ÁFOR
BENZIN-OLAJ

HUNGARA VIVO

1971. XI. jaro, 3-a numero

Titolpaĝe: Fotoportreto de K. Kalocsay, fare de János Eifert
Ivo Lapenna: Al Kálmán Kalocsay 1
William Auld: K. Kalocsay . . 2
Angla gazetaro pri la hungara krono 2
Juan Régulo-Pérez: Saluton al Kalocsay, 80-jara 3
L. Tárkony: Intervjuo kun Kalocsay 4
K. Kalocsay: Kion fari por la E-a literaturo 6
V. Benczik: Vespero sur la ponto 8
Mihály Váci: Sen titolo. Tr. Kalocsay 9
Panoramo. Komp.: *J. Szekeres.* 10
K. Kalocsay: Diskuteto pri apostrof-ekstermo 12
Lajos Nagy: La sentalenta verkisto. Tr. Kr. Nyitray 13
János Tóth: Intervjuo kun prof. Bruno Straub 14
Enhavtabelo de H. V. 1961—1970. Kunmetis *L. Kökény* . . . 15—18
gm.: Zoltán Balássy 20
Károly Bari: Migraj ciganoj. Tr. Kalocsay 20
Humuro 22
Esperanto-semajnoj en Hungario — 1972 22
László István: Ányos Jedlik kaj lia dinamo 22
A. Pechán: Ladislao Somlai (nekrologo) 24
Vizito ĉe la 3-a Teritoria Komitato de HEA 25
L. L.: Komponi aŭ vivi 25
L. Tárkony: Revuo de Revuoj . 26
Zs. Varga—Haszonits: E-tagoj en la Budapeŝta Universitato . . 28
Korespondi deziras 28
El la leteroj 29
A. Pechán: Antaŭ dulingva aŭskultantaro 29
Najbareco, amikeco 29
Gy. Szondi: Perspektivoj de veterfabrikado 30
R. Eicholz: Slipara Vortaro. Rec. *E. Fenyvesi* 30
Hungara dramfestivalo en USSR 30
Feri: Krucvortenigmo „Libero kaj amo" 31
Interparolo kun Alina Nowak 32

Ivo Lapenna

AL KÁLMÁN KALOCSAY

Facile mi povus preni el la librośranko ĉiujn verkojn de Kálmán Kalocsay kaj amasigi ilin ĉemane apud la skribotablo. Estus vera intelekta ĝuo trafoliumadi dum horoj jen unu jen alian libron, halti ĉe tiu aŭ alia parto, denove admiri la plej brilajn paĝojn en la senmakule brila tuto. Same facile estus eligi el la arkivo de CED la multnombrajn informojn pri liaj vivo kaj laboro. Estus plezuro pasigi kun ili kelkajn pliajn horojn por vivigi la memoron.

Konsultinte tiel tiun tutan materialon, mi povus skribi longan, belan biografian artikolon kun multaj datoj kaj amaso da aliaj ĉiaspecaj detaloj.

Konscie mi rezistis la tenton agi tiel: en la nuna momento la bildo de Kálmán Kalocsay restu tia, kia ĝi estas en mia menso, sen iaj ajn aldonaj stimuloj.

Kiajn asociiĝojn, do, elvokas lia nura nomo?

Por mi Kalocsay estas unu el la plej multflankaj kleruloj iam renkontitaj, kies naturan genion kompletigas giganta intelekta aktiveco kaj senlaca strebado al perfekteco. Ni ĉiuj scias: per siaj majstraj tradukoj kaj originalaj verkoj li riĉigis la Esperantan literaturon kaj donis esence novan kulturan enhavon al la Internacia Lingvo. Sed tio estas nur unu rezulto de lia ampleksa literatura laboro. La alia estas, ke tra tiu impona arta kreado li samtempe malkovris — en la vera senco de la vorto — ĉiujn kaŝitajn esprimeblecojn, kiujn la genio de Zamenhof enmetis en la lingvon parte konscie, parte intuicie. Kalocsay sukcesis transformi jam vivantan, sed ankoraŭ iom krudan lingvon, en delikate nuancitan artan esprimilon. La fakta paralela riĉigo de la Internacia Lingvo mem trovis adekvatajn klarigojn kaj analizojn en liaj unuarangaj lingvosciencaj verkoj. Eksplode ŝvelintaj artaj kaj intelektaj bezonoj devigis lin serĉi novajn konvenajn vortojn kaj formojn en la vastaj, sed strikte difinitaj limoj de la Fundamento; trovinte ilin, li lucide formulis regulojn el la bazaj principoj.

Eĉ per tio lia rolo ne finiĝas. La meritoj de Kalocsay vaste transpasas la sumon de lia verkaro kaj entute de lia enorma kontribuo al la Esperanta literaturo kaj al la lingvoevoluo.

Li ne nur transdonis al la nova generacio de verkistoj maksimume perfektan lingvoinstrumenton, sed ankaŭ inspiris ilin al plua poezia kaj proza literatura kreado. Al aŭtoroj de lernolibroj, siatempe inkluzive min mem, li abunde liveris gramatikajn precizigojn kaj tiel helpis al plia fortikigo de la lingva unueco. Ĉiuj — eĉ tiuj maloftaj, kiuj, malfeliĉe por ili, neniam legis unusolan lian paĝon — lernis kaj plu lernas el liaj scioj pere de tiuj, kiuj lernis de li. Eĉ sur la kampo de informado kaj disvastigado de la lingvo lia verkaro okupas la unuan lokon, kiam ajn necesas prezenti la kulturan valoron de Esperanto.

Sen Kalocsay la Internacia Lingvo certe ne estus tio, kio ĝi estas hodiaŭ.

Nun Kálmán Kalocsay fariĝas 80-jara. Tiun datrevenon akompanas gratuloj kaj bondeziroj el la tuta mondo, unuavice tiuj de Universala Esperanto-Asocio, por longa, feliĉa vivo kaj por plua fruktodona laboro. El la malproksima Londono mi etendas ambaŭ miajn manojn al Budapeŝto por ĉirkaŭpreni lin varme kaj danke pro ĉio, kion li faris por la Internacia Lingvo, kaj pro lia multjara amikeco.

Tamen, por mi Kalocsay ne estas 80-jara, nek 40-jara, nek X-jara. Por mi li estas ekstertempa kaj eksterloka: li estas Kálmán Kalocsay. Li estas koncepto.

K. KALOCSAY

Estas por mi malfacilè, oni povas diri preskaŭ neeble, skribi objektive pri Kalocsay. Mi neniam renkontis lin, tre malofte ni interŝanĝis korespondaĵojn, tamen lia granda influo formis la ĉefbazon de mia esperantista kultureco kaj lia verkaro estis la ekscita ĉefstudaĵo de mia privata esperantista universitato. De Zamenhof mi ensorbis la ideologion de la mondolingvo, sed de Kalocsay unuavice ĝian spiriton, ĝian esprimivon kaj ĝian poeziecon — ĉio ĉi, komprenèble, sub la mentorado de Rossetti, alia disĉiplo de la Granda Poeto.

La dua libro, kiun mi legis en Esperanto, estis la dantea „Infero", la tria estis la madaĉa „Tragedio de l' homo" — hazarde elektitaj el librolisto; pri la tradukinto en tiu momento mi eĉ ne aŭdis, ĉar la movadon mi estis neniam kontaktinta. Prezentu al vi la efikon de tiuj grandiozaj originaloj en grandioza traduko sur la animon de poeziema 22-jarulo! (Se, el la tuta verkaro de Kalocsay, mi devus nomi la volumon, kiu plejmulte influadis mian tutan evoluon spiritan kaj krean, tio tamen estus la „Hungara antologio": Babits, Kosztolányi, Szép k.a. ŝajnis al mi miaj konatoj ne malpli ol la skotaj kaj anglaj poetoj de mia hejmlanda kulturo. Kiam miavice mi entreprenis tradukadon de tiuj lastaj, min subtenis en ĉiuj ŝajne neelireblaj dilemoj la penso, ke „Kalocsay tamen sukcesis ĉe Petőfi kaj Arany"...)

Kaj nun li atingis sian okdekan jaron, kaj en tiu ĉi jaro aperos la tria el liaj novaj ŝekspirtradukoj — tradukoj, kiuj ne nur ne montras signojn de kadukiĝo, sed vere kaj efektive atingas novajn altojn de la tradukarto! Antaŭ tia daŭra, vivolonga progresigo de la „plej malfacila el ĉiuj artoj" oni volas stari silente admiranta. Ke la tuta kulturo de Esperanto spegulas tiun progreson, ĉe kies pinto staris ĉiam Kalocsay, ĝin kvazaŭ post si trenante, estas la videbla pruvo pri la nesuperita rolo, kiun li ludis kaj ludadas en nia kulturmovado. Sen li, oni eble devus cedi antaŭ la asertoj de tiuj filistroj neesperantistaj, ke Esperanto estas ĵargono senkultura kaj senliteratura. Pro li (pro liaj propraj verkoj, kaj tiuj, kiujn lia ekzempligo inspiris) ni povas fiere rebati, ke tiuj homoj tutsimple mensogas.

Progresigo de la lingvo estas frazo, kiu ne signifas „enkonduko de multaj novaj vortoj". En la ĵus aperinta „Kantoj kaj romancoj" de Heine, troviĝas jena beltrafa verskvaro:

> Malesper' min superfortis:
> ĝin elporti estas tro!
> Fine tamen mi elportis.
> Ne demandu, kiel do.

Tre multaj provoj estas faritaj dum la ekzisto de Esperanto, solvi tiun traduktaskon; jen ni havas solvon definitivan; sed ĉiuj rimedoj por solvi ĝin ekzistis jam en 1887, kun escepto de tiu maturigo kaj fleksebligo de la lingvomaterialo, kiun ni ŝuldas antaŭ ĉio al Kalocsay. Tia estis lia rolo, kaj tiel li plenumis ĝin.

Tárkony skribis (1966): „Eble neniu kiel li sekvis la zamenhofan postulon: surpreni malfacilajn traduktaskojn ĉar nur tiamaniere la lingvo ellaboriĝos'." Tio estas fakto, eĉ sen la ĝentila komencvorto „eble". Kiel originala poeto, Kalocsay donis surprize malabunde. Praktike, liaj volumoj estas nur du, ĉar la ceterajn glutis la mondmilito. (Feliĉe tamen, la ĉefaj poemoj estas kolektitaj en „Ora duopo", 1966). Malgraŭ tio, la nombro de poemoj „eterne valoraj" estas surprize alta. Sur tiu ĉi kampo lia influo, kvankam reala, estas malpli okulfrapa, ĉar antaŭ ĉio ĝi konsistis el indiĝenigo de la *formoj*. Tiuj formoj, kiujn ni nun akceptas senpense — aŭ eĉ jam ekevitas! — ja ekzistis en multaj lingvoj, sed en Esperanto ilia rajtigo estis hezita kaj necerta. Post Kalocsay, ili fariĝis niaj — oni povus diri: niegaj! Kiam ajn la historiistoj rigardos la internacilingvan kulturon, ili difinos al Kalocsay elstaran lokon, ne nur kiel al tradukisto, ne nur kiel al iniciatinto de la matura versarto, sed ankaŭ kiel al la poeto, kiu verkis multajn senmortajn lirikojn. Kiel mi skribis iam:
Al li ŝuldiĝas niaj memfidaj fortoj,
nia fruktanta nuno. Al li la gloro!

WILLIAM AULD:
Direktoro de la iama Literatura Sekcio de la Akademio.

La angla gazetaro pri la hungara reĝa

En la angla gazetaro aperis du interesaj artikoloj pri la sorto de la krono de reĝo Stefano I. (reĝanta de 1001 ĝis 1038) kaj pri la sorto de aliaj juveloj, apartenantaj al la hungara nacia heredaĵo. La gazeto *Times* en granda artikolo okupiĝis pri freŝa artikolo de la semajngazeto *Magyarország* (Hungario), koniganta la peripetiojn de la kronjuveloj kaj tion, ke la registaro de Usono de post la dua mondmilito senrajte posedas la nacian relikvon.

Koncerne al tio, *Times* metis demandon al *A.J.P. Taylor*, unu el la plej aŭtoritataj anglaj historiistoj, kaj ĉi tiu respondis, ke „la kronjuveloj estas naciaj propraĵoj de Hungario kaj ili devas reveni al la hungara registaro. Ĝi estas universale rekonita, laŭleĝa registaro. Se Usono militus kontraŭ Hungario, aŭ ne estus rekoninta la

SALUTON AL K. KALOCSAY 80-JARA

Mia legkontakto kun K. Kalocsay okazis iam, ĉirkaŭ 1933, kiam mi abonis ĉiujn AELA- kaj aĉetis kelkajn aliajn LM-librojn. *Infero, Lingvo Stilo Formo, Strečita Kordo* ... ĝisekzalte firmigis mian tiam ankoraŭ labilan esperantistiĝon. Kiam iom poste mi devis pli ol tri jarojn deĵori en malliberejoj dum la hispana interfrata milito, inter la kvin libroj, kiuj min ĉiam akompanis, du estis de Kalocsay. Finiĝis la hispana civila milito kaj komenciĝis la tutmonda. Denove izolo. Mi memoras la emocion, per kiu mi malfermis la unuan kajeron, venintan tra Svedujo, de la renaskiĝinta „Literatura Mondo" 1947. Tie mi renkontis la saman Kalocsay, kiun mi sciis transvivinta la ŝtormon el disaj pecoj aperintaj en „Internacia Kulturo", tiu gravega postmilita kaj nun preskaŭ forgesita revuo, kiun, jam en 1945, lanĉis la bulgaraj esperantistoj kaj ĉe kies naskiĝo kaj vivo tiel efike intervenis amiko Asen Grigorov. Sed baldaŭ la Granda Silento ĉion denove englutis ... Miaj unuaj leteraj kontaktoj kun la admirata majstro okazis iom poste, kiam mi eldonis *La Florojn de l' Malbono*, kies kunredaktoro li estis. De tiam niaj leteraj kontaktoj ne ĉesis. Sed devis veni la UK de Budapeŝto 1966 por persona renkontiĝo.

Kio ĉiam min plej frapis de Kalocsay, estas lia nešancelebla fidelo: li ĉiam sciis trovi la apogilon, la necesan bazon por denove stimuli kaj fidigi post ĉiu malluma periodo. Se la iluzio, kiu malavare fruktigis mian esperantistan vivon per tre belaj momentoj, foje iom meandris, foje iom cedis el sia impeto, tamen ĝi ankoraŭ firme nestas ĉe mi, kaj unu el la fortikaj subtenpilieroj de tiu iluzio estas ja Kalocsay: li ĉiam sukcesis refirmigi mian kredon je la futuro de la afero. Aldone li sciis sanigi angorojn, forviŝi hezitojn: ne vane li ja ankaŭ estas kuracisto!

Forpasis preskaŭ kvardek jaroj. Dum tiu tempo Kalocsay, ĉu en ombro, ĉu en lumo, daŭre montris al ni, per sia vivekzemplo, kiel oni sin donas al elektita alvokiĝo. Sinsekve li naskis librojn, artikolojn, poemojn, ĉiam avangarde de la plej sana vivofido. Kiom facile certe estintus al li, meze de tiom da tumultoj kaj perfortoj, meze de tiom da transformiĝoj, surpaŝi vojon al rapida, spektakleca profitakiro. Sed Kalocsay, ankaŭ majstro de la vivarto, nur fosis sian sulkon!

Aliaj pli doktaj certe scios reliefigi, kion Esperanto ŝuldas al Kalocsay pri literatura kritiko, spirita kaj arta historio de nia beletro, erudicio, bibliografio, gramatiko, stilistiko, problemoj pri fontoj kaj inspiro de nia tradicio, leksikologio, tradukarto ... Miaparte, mi volas nur atesti mian dankon, mian amon, mian admiran submetiĝon al liaj kapabloj kaj al lia ekzempla vivovojo. Aliaj parolu pri la lingvoforĝisto, pri la elfosinto de niaj malnovaj valoroj, pri la literatoro, pri la genia transverŝinto en Esperanton de eternaj beloj beletraj el ĉiuj kulturoj kaj epokoj ... Jes, ĉio ĉi tio ekzistas, kaj tion oni universale agnoskas.

Sed hodiaŭ, kiam mi verkas tiun ĉi salutartikolon okaze de lia 80-a jaro, mi volas aparte reliefigi konstantaĵon de Kalocsay. Temas pri lia respondecosento kontraŭ la lingva pliriĉigo. Mi vidas en Kalocsay grandan bubon, kiu jen per neatendita sed pasema malhumuriĝo, priokupita kaj grumblanta (je kioma fojo?), plenfide kaj celkonscie skribis kontraŭ tiu sensubstanca, griza, neevitebla mizero de nia recenzo, kiu naive kredas kaj volas kredigi, ke la beletraj neologismoj estas grava malhelpo por nia afero. Jen kion li stampis sur la marĝeno (paĝo 104) de sia lasta libro, *La Tempesto* (silenton!):

La zeloteco de lingva paŭperismo en Esperanto havas komunan originon kun la zeloteco de naturalitate *en la okcidentismaj planlingvoj, nome defetismon (nefidon je venko). Ĉar por venkinta internacia (ĉies dua) lingvo estas de nenia signifo la pli granda vortostoko unuparte kaj la litera senĉapeleco aŭ unuavida komprenebleco (por kiu?) aliparte.*

Nu, mi celis (mallerte, jes ja) nur saluti la vivodonan kaj nelacigeblan garbiston, kiu estas K. Kalocsay, nia amiko.

J. Régulo

krono kaj pri la kronjuveloj

nunan registaron, tiam ĝi havus ian rajton por la reteno. Sed tiel la tuta afero estas pli ol iom skandala."

Tiun ĉi aferon alparolis ankaŭ *Sunday Express* (tute ne akuzebla pri maldekstrismo) kaj eĉ ne en ia ajn gloso, sed en gvidartikolo. La gazeto postulis, ke prezidanto *Nixon* tuj redonu la kronjuvelojn al la registaro de la Hungara Popolrespubliko. „Ne povas esti dube, ke la krono estas rajta posedaĵo de la hungara popolo. La usonanoj tamen rifuzis ĝian redonon, kvankam en tiu ĉi afero venis al ili inundo da petoj. Kial do? Estas eble, ke la koloro de la hungara registaro ne estas laŭ ilia gusto, sed ili devas rezignacii je tio, ke tiu ĉi registaro restos en vivo. Prezidanto Nixon devos ordoni, ke oni tuj redonu la kronon, aŭ male li devos defendi sian landon kontraŭ la akuzo pri *ordinara ŝtelo*" — diras la gvidartikolo.

Lajos Tárkony

Intervjuo kun K. Kalocsay

Komisiite per la agrabla tasko intervjui la okdekjaran K. Kalocsay, mi vizitis la jubileulon kun sento pli solena ol ĉe la kutimaj semajnaj vizitoj. Mian solenan senton ankoraŭ pliigis, ke en mia teko kaŝiĝis soneto verkita je lia honoro.

La floron la vizitanto transdonas tuj post la enpaŝo, tiel same mi faris pri la soneto, kiun, akirinte por tio la aprobon de la jubileulo, mi kopias ĉi-sekve:

KALOCSAY

El via mond' kaj koro via strečita kordo
sonoris en junaĝo kaj kaptis korojn rete,
verdstelo-astronomoj aperis rimportrete,
la lingvo, stilo, formo perfektis en akordo.

Poetoj triumfmarŝe, tuta geni-kohorto
eniris Esperanton ĥore, eternbukede,
la korv' de Poe grakadis, la sorĉlernant' de Goethe
baraktis, nimfoj ploris pro la Ignez-a morto.

Inter tercinoj rimaj, per ruĝa flam' mordante
hororas mezepoke infera fajr' de Dante;
Petőfi flamas, Heine fajreras en transvesto;

Ŝekspiro voĉas venke en Sonĝo, Lear, Tempesto.
Da versoj kvindek miloj: via traduklaboro
kvar kontinentojn ehas: tutmonda verssonoro.

Aranĝinte la aferon pri la soneto (tio kostis al Kalocsay embarasan rideton, kap-balancetojn kaj kap-ŝanceletojn, kies signifon — ĉu aprobaj aŭ malaprobaj — mi ne sciis precize deveni), mi transiris al atako kun la nepre nekutima demando:

— Kiam kaj kiel vi fariĝis esperantisto, kio vin altiris ĉefe ĉe la ekkono de la lingvo?

— Ĉi tiun demandon mi atendis kaj timis. Sed, feliĉe, mi povas resendi al pluraj miaj respondoj, precipe al tiu en Arĝenta Duopo. Nun mi diras nur, ke mi esperantistiĝis dank' al Hazardo aŭ Providenco, Dio aŭ Lucifero, Ormuzdo aŭ Ahrimano. Ne mirinde, ke mi ne povis rezisti al tia transcende determinita destino.

— Bone, mi vidas, ke vin tedis la demando. Volu do diri, kia vi vidas la futuron de Esperanto?

— Lastatempe oni aŭdas ne-malmultajn esperantistajn lamentojn pri la tro lanta progreso de la Esperantomovado. Tiajn plendojn propre naskas senpacienceco. Kaj ĉi tiu estas unu el la plej grandaj danĝeroj en ĉiu teritorio, ĉu temas pri Esperanto, politiko aŭ ekonomio. Ĉar ĝi kondukas aŭ al la defetismo, aŭ al la ĉef-ĉefpeko de voluntarismo (ĉi lasta vorto mankas en PIV; Albault-Léger proponas: „volismo"). Vi mem skribis pri komplikaj psikologiaj kaŭzoj, kiuj malhelpas, ke grandaj kaj etaj lingvoj sin ŝirmu per neŭtrala interkomprenigilo., Nu, pli ĝuste estus paroli pri psikiatriaj kaŭzoj. La racio postulas Esperanton, la racio postulas ankaŭ tion, ke la homaro ne ekstermu sin mem per frenezula uzo de geniulaj eltrovoj; la du aferoj estas analogaj kaj la ŝancoj estas egalaj, pozitivaj aŭ negativaj laŭ tio, tra kiakoloraj okulvitroj oni rigardas la mondon.

— Kiel statas nia gramatiko? Ĉu la dekses reguloj sufiĉos por malhelpi, ke gramatikaj disopinioj (ekzemple pri ata-ita) rompu la unuecon de la lingvo?

— Nenio tia estas timebla. Pruve: atistoj kaj itistoj kverelis longe kaj larĝe, kaj siajn Esperantajn tekstojn bonege ili komprenis reciproke.

— Vi ofte parolis al mi pri socialaj kaj futurologiaj aferoj, kiel vi povus nun mallonge resumi vian opinion pri la futuro de la homaro?

— Estas tre ĝenerale konata fakto, ke la homan rason pluraj danĝeraj faktoroj minacas per pereo: la t.n. polucio, t.e. la venenado kaj malpurigo de la homara medio, la „demografia eksplodo", la rompo de la biologia ekvilibro de nia tero kaj la jam menciitaj potencegaj eltrovaĵoj de la scienco, disponataj ankaŭ de timige strikt-intelektaj individuoj. Tamen ŝajnas al mi konsola, ke kontraŭ la misagado de ĉi lastaj vekiĝis kaj vigliĝas mondvasta movado. Grandaj amasoj el la junularo faris jam ĝustan diagnozon pri la malsano de la mondo. Apenaŭ iam okazis en la historio, ke miloj da dekoritaj soldatoj manifestacie forĵetis siajn militajn honordistingaĵojn. Kun kia sento de nun tiuj estos donataj aŭ akceptataj? Sekve, ni esperu, dum ni spiras. Se la homaro, veninte al tia supro, kie ĝi povus al si konstrui grandioze harmonian vivon, lasus sin pereigi per idiotaj potencoj monopolistaj-militistaj, ĉi tio vekus en la Universo tian titanan ridegon, ke tio ekskuus nian tutan galaksion.

— Kion vi opinias pli grava kaj akceptinda aktuale, ĉu la originalan aŭ la tradukitan literaturon en E-o?

— Se mi bone memoras, komence de la tridekaj jaroj granda diskuto okazis pri ĉi tiu demando en

Literatura Mondo. La karmemora *Lejzerowicz* tute rifuzis la originalaĵojn E-ajn, vi mem kaj certa *E.G.* defendis ilian ekzistrajton. Ankaŭ miaopinie, la E-aj originalaĵoj neniel estas maleblaj aŭ nedezirindaj, sed mi decide malaprobas, ke la tradukadon de ĉefverkoj oni subtaksu, neglektu aŭ eĉ malhelpu. Anstataŭ longa argumentado, mi diras nur, ke ĝuste la adekvata tradukado devigas je tiu „solvo de malfacilaj taskoj" insiste rekomendita de Zamenhof, dum ĉe la originala verkado la aŭtoroj, kiel Kabe diris, povas iele-tiele sin eltiri, evitante pene troveblajn esprimojn . . . Ankaŭ eksteren pli efikas, se oni listigas la verkojn tradukitajn ekz-e el Shakespeare, Calderón, Goethe, Heine, Molière, Racine, Baudelaire, Ibsen, Puŝkin, Tolstoj, Gorkij ktp., ol se oni volas fanfaroni per la dekdu originalaj poemlibroj de certa tutmonde nekonata X. Y. Kaj por entuziasma, „konscia" esp-isto la konkero de la ĉefverkoj de la mondliteraturo devas ja esti tia sama ĝojo kaj fiero, kiel la naskiĝo de originala E-a poezio kaj prozo. Kontraŭ ĉi lastaj *Lejzerowicz* siatempe argumentis per tio, ke la esp-istoj diverslande dissemitaj ne vivas tian socian vivon, ke ili povu liveri temon por novelo, romano aŭ dramo. Mi tute ne negus tion tiel rigide. EMBA montris, en sia „Maria kaj la grupo", ke en esperantista rondo povas okazi eventoj kaj konfliktoj sufiĉaj por romano; se lia romaneto ne fariĝis ĉefverko, ties kaŭzo ne estas ĝia temo, sed ĉi ties hasta kaj iom surfaca ellaboro. Mi povas al vi elfantazii eĉ krimi-romanon kun esperantista medio. Imagu: Grammat, fama kaj riĉa espisto estas murdita per papertranĉilo. La fadenoj kondukas en multajn direktojn: hereduloj, financaferoj, ama malfidelo, neleĝa filo vivanta mizere, delonga malamikeco ktp. La detektivlaboro fiaskas. Tiam juna esp-isto malkovras, ke la murdinto estas la plej bona amiko de Grammat. Ili ambaŭ estis ĝisostaj atistoj, sed Grammat konvertiĝas al itismo, kaj tion deklaras al sia amiko kune kun sia decido konfesi la aferon publike. Tiam la amiko pro furiozo trapikas la koron de Grammat. Aŭ jen estas alia temo: Esplorvojaĝanto trovas en la plej nekonata parto de Sud-Ameriko tribon, kiu parolas ian strangan lingvon, pli latinid- ol indian-karakteran. La tribanoj rakontas al li (unu el ili iom balbutas hispane), ke tiun lingvon ili lernis de granda blanka sorĉisto antaŭ 50 jaroj; la blankulo donis per tio grandan helpon, ĉar ili, kunmetiĝintaj el kvar diverslingvaj malmultiĝantaj triboj, ne komprenis unu la alian. Post dek jaroj mortis la granda homo. La vojaĝanto kolektas tekstojn kaj en Eŭropo ekzamenigas ilin per lingvistoj. Ĉi tiuj konjektas ion latinidan en la tekstoj, sed en tute taŭzita formo. Febra fervoro ekregas la lingvistojn: aperas 16.824 sciencaj artikoloj kaj 189 libroj demonstrantaj, argumentantaj, analizantaj, hipotezantaj. Fine esp-isto malkovras, ke temas pri dialektiĝinta E-o. Aperas triumfantaj artikoloj el la plumo de tiuj lingvistoj, kiuj antaŭdiradis la disdialektiĝon de E-o okaze de ties internacia kaj ĝenerala enuziĝo. Sed tiam grandfama lingvisto montras, ke la kaŭzo de la dialektiĝo estis nur la plena izoliteco de la tribo. La internacie uzata E-o, male, neniom disdialektiĝis dum tiu duonjarcento. Kaj tiam okazas miraklo: profesiaj lingvistoj lernas E-on, studas ĝian strukturon, evoluon, literaturon, sintakson, prozodion, fonetikon en 16 927 artikoloj kaj 198 libroj. Fu, iom tro galope mi babilis, imagante ĉion ĉi.

— *Multaj rimarkis kaj rimarkigis, ke via originala poezio estas neproporcie malpli ampleksa ol via traduklaboro. Kion vi dirus pri ties kaŭzo?*

Tio postulus pli da spaco, ol pri kiom ni disponas. Jen kelkaj faktoroj subite venantaj al mi en la kapon. Unue, la Zamenhofa tradicio de poezio pri ia E-a patriotismo eksmodiĝis nedaŭrigebla. Due, mankis, eĉ se ne ĉiam, sed plurfoje kaj daŭre, la ekstera instigo, la eĥo, la intervibrado de kantanto kaj alkantatoj, sen kiu la „kordoj" rustiĝas. Trie, la poemoj, entute, eksmodiĝis en E-ujo (oni devas ja rigardi jam escepta sukceso, ke „La Infana Raso" aperis en dua eldono 15 jarojn post la unua!). Kvare, la tuta poezio venis en krizon: ritmo kaj rimo fariĝis ridindaj ornamaĉoj; persona lirikismo ekskomunikiĝis; kompetentaj nazoj kuntiriĝis grimace, se ili entute ekflaris ian temon, aŭ, eĉ, Dio gardu, ian sencon en poemo; venis ankaŭ la „konkreta poezio", kiu jam eĉ abstrakta ne estis plu. Kvine, mi laboris ĝis mia maljunaĝo en ne-poezio-speca profesio, de kiu pli facile estis ekskursi por difinitaj horoj en la mondon de Dante aŭ Baudelaire aŭ Shakespeare, ol droni en la profundan introspekton bezonatan por poetado. Sese, mi evoluigis por mi versan lingvaĵon por povi plej precize kaj fidele interpreti la direndan penson aŭ senton eĉ en komplikaj kaj teknike malfacilaj formoj; estus sensence ne uzi ĉi tiun instrumenton por traduko de ĉefverkoj, sed, laŭ la postulo de la modo, uzi ĝin por nasko de originalaj poemoj plej zorge nekomprenebligitaj. Sepe, mi diris jam, ke la tradukojn mi rigardas tre gravaj: per bona, laŭeble adekvata traduko de ĉefverkoj devas ja prepariĝi la E-o de la futuro.

Pri kio vi okupiĝas nun kaj kiajn projektojn vi havas?

Mia ĉefa laboro estas la „Domfabriko", pri kiu niaj legantoj certe estas orientitaj. Poste, mi provas kunmeti libron de eseoj el miaj artikoloj aperintaj dise dum jardekoj. Mi koketas kun la aranĝo de mia antologio „Tutmonda Sonoro". Mi tradukas la latinan poeton Catullus, por havi de li la kompletan poemaron en E-o. Mi revas pri verkado de futurromano, laŭ kiu la homoj, en la jaro dumil-kelkea, reguliginte prudente sian konton kun la teknika civilizacio, vivas preskaŭ feliĉe kaj harmonie. Jes, *preskaŭ* feliĉe. Stulte estus imagi futuron iam-ajnan *absolute* feliĉa. Por la bona animfarto de la homo nepre necesas iom da salo de malkontento; krome, la maksimumismo estas malbona afero: ĝi kondukas al pesimismo. Kiel vi vidas, da planoj mi havas abunde; tion oni jam povas riski senresponse en mia aĝo.

— *Mi esperas, ke vi bezonos ankoraŭ fari novajn projektojn post la plenumo de la nunaj.*

Nu, ni estas ja „esperantoj".

K. Kalocsay

Kion fari por la Esperanta literaturo

Multe oni meditas nuntempe pri la sorto de la Esperanta literaturo; tio montras, ke por tio ekzistas kaŭzo malkontentiga. UEA eĉ estigis komisionon por la studo kaj solvo de la ĉi-rilataj problemoj; laste *V. Benczik* artikolis en H. V. kaj provis trovi balzamon por la vundoj de la E-aj Muzoj. Li skribas, ke la esperantistoj estas fieraj, eble tro fieraj pri sia literaturo.

Tamen, ĉu vere oni povas ĉi tion aserti decide? Pri kio oni estas fiera, tion oni subtenas kaj vartas, t.e., se temas pri literaturo, oni ĝin aĉetas kaj legas. Sed la meza eldonnombro de E-aj libroj estas 1000 kaj tio ne montras tumulton da aĉetemuloj. Kaj en ESPERANTO de UEA mi legis foje leteron de leganto, kiu rekte indignis pri tio, ke oni volas trudi al li la devon legi E-ajn literaturaĵojn (kaj eĉ elspezi por ili monon!); lia protesto havis la forton de tia konsterniĝo, kiun povas senti senkulpulo kondamnita je ĝismorta punlaboro. Kaj vane mi atendis, neniu lin poste kontraŭindignis. Alifoje la demando estis metita jene: kio pli necesas nuntempe, ĉu Mona Lisa aŭ pano, t.e. ĉu ni flegu la beletron aŭ ni servu al la reala vivo per teknika-scienca literaturo. La konkludo estis, ke ni ne rezignu pri Mona Lisa, sed por kelka tempo ni ĝin pendigu iom flanke. Stranga fiero estas, kion oni pendigas iom flanke.

Sed kion ni pendigu do ĉefloke? Ĉu teknikajn-sciencajn librojn? En kiom da ekzempleroj? Ili parolos ja nur al eta parto de la esperantistaro (ĉiu faklibro al la respektivaj fakuloj), do neniel ili povos trovi eĉ frakcieton de la aĉetantaro de l' beletro, parolanta al ĉiu, almenaŭ teorie. Krome, la sciencoj pli kaj pli disfakiĝas kaj la rapidega evoluo baldaŭ arkaikigas la faklibrojn. Kiel la E-a libro-eldono povus fari tiun vetkuron kun la tempo? La beletro almenaŭ estas pli malpli tempo-rezista. Do, se ni deprenos de la ĉefloko nian „Mona Lisa", mi timas, ke sur ĝia loko restos nur malplena muro.

Vole-nevole, ni devas rigardi la literaturon kiel ĉefan eldonotaĵon, se entute ni volas, ke io estu eldonata. Kaj ni devas tion voli, ĉar ĉesigo de libroeldono estus fatala por Esperanto. En 1895, certa sinjoro, en letero skribita al „La Esperantisto", pridubis la bezonon de la „Biblioteko", kiu estis serio de libroj kun literatura enhavo. *Zamenhof* tiam respondis (O. V. p. 202 k.c.): *„Floros la Biblioteko, floros ĉio, falos la Biblioteko, falos ĉio".* Kaj li emfazis, kiel favoran efikon li spertis de sia traduko de Hamleto, kiel ĝi donis al la movado novan energion, helpis unuigi la disopiniantojn. Mi opinias, ke la Zamenhofa devizo ankaŭ nun estas valida: *Floros la literaturo, floros ĉio, falos la literaturo, falos ĉio.*

Sed kiel trovi la eblaĵojn por tiu florado?

Unue, ni devas konscii, ke la ekziston de literatura eldonado ni povas certigi nur per la konsiderinda pligrandigo de la eldonkvantoj. La nuna mizera malmult-ekzemplereco kaŭzas:

ke la libroj estas multekostaj, sekve nesufiĉe aĉetataj, sekve ne eldoneblaj pli mult-ekzemplere — tipo de „peka cirklo";

ke la eldonejoj ne povas pagi honorarion, tial talentuloj, se ili volas vivi per sia literatura laboro, verkas, eĉ devas verki nacilingve.

Evidente, ni devas serĉi do la kaŭzojn de la mizera lingvo-debito en E-o kaj la rimedojn kontraŭ tiuj kaŭzoj. La ĉefrimedon jam nomis *V. Benczik* en sia artikolo: ĝi estas *organizo.* Sed liaj proponoj pri organizo ŝajnas al mi ne sufiĉe vastaj; mi nun volas starigi kiel eble vastan programon, kies plenumo koncernus ĉiujn niajn lingvajn kaj movadajn instituciojn.

Ni vidu do unuope la kaŭzojn kaj rimedojn.

1. La E-aj eldonejoj ne tre scias, kiajn legaĵojn deziras la E-a publiko. Oni devas do fari *merkat-esploron tute larĝan,* do anstataŭ la 80 personoj, kiujn demandis la komisiono de UEA, demandi plurajn milojn. Tion, kompreneble, ne povus fari la komisiono mem, sed ĝi devus peti la helpon de la naciaj societoj. Ĉi tiuj, siavice, pridemandu siajn membrojn, kiujn librojn ili legus volonte en E-o. La aferon oni plifaciligus tiel, ke oni farus liston pri libroj (eble 20—30—50), kaj poste oni kvazaŭ voĉdonigus la esperantistojn, kiuj ankaŭ povus aldoni sian proponon. La libroliston oni povus kunmeti el titoloj, kiuj atendas la eldonon ĉe eldonejoj kaj el famaj, furoraj titoloj. Siatempe ankaŭ la eldonejo Literatura Mondo faris tian voĉdonigon inter siaj klientoj. Ĉi tiu tuta procedo havus ankaŭ la utilon, ke estiĝus kelka bruo pri la literaturo en E-ujo, kaj per tio la atento estus vekita pri ties graveco.

2. Multaj homoj volonte aĉetas libron ekviditan en montrofenestro aŭ ŝovitan sub ilian nazon, sed estas tro komfortaj mendi la libron aŭ serĉi ĝin, post kiam ili elserĉis, kie ĝin serĉi. Jen unu el la malsan-

kaŭzoj: *manko de taŭga kolportado.* Oni devas do organizi la vendadon de la libroj: en ĉiu urbo kaj en ĉiu grupo devas troviĝi „*librodelegito*" aŭ „*libro-responsulo*" okupiĝanta pri la prezentado, antaŭ-nazon-ŝovado kaj vendado de libroj E-aj. Por ke li havu por tio emon, oni devas apliki la „fenican inventaĵon": li ricevu procentaĵon laŭ la venditaj libroj.

La mankon de kolporta lerto plej bone montras, ke la *kongresoj* tute ne estas bone fruktuzataj por librovendado. Ne sufiĉas unu stando, plurfoje lokita apenaŭ troveble, sed oni devas tie la librojn propagandi per la forto de la viva voĉo, eble inter la kadroj de humura vespero aŭ danckanta festivalo aŭ elekto de belreĝino ktp. (oni ne estu tro elektema en la rimedoj).

3. *Mankas favora etoso por la libroj,* se ne diri, ke por la literoj entute. Mi jam aŭdis aŭ legis: „Kial mi legu novelojn aŭ poemojn en E-o, kiam ankaŭ en mia gepatra lingvo mi ne legas tiaĵojn?" Lerta „libro-delegito" povus lin konvinki, ke dank' al E-o li povos do havi tiajn plezurojn, kiajn alie neniam li akirus. Emfazi la gravecon de la literaturo, veki pri ĝi intereson oni devus en la E-aj grupoj kaj gazetoj.

a) La *grupoj* ofte ne scias fari por si programon en la klubvesperoj. Nu, oni povus tie interese *konigi librojn* kaj tuj *vendi* ilin al la interesiĝantoj. Se temas pri poemlibro, oni povus fari prelegon pri iu poemo kun la titolo: „Kial ĝi estas bela?" La hungara Radio havis tian programeron tre ŝatatan kaj post ties dissendo tuj kreskis la debito de la poemlibro entenanta la pritraktitan poemon. La naciaj societoj devus fari komisionon, eĉ konstantan komitaton el inteligentaj literatoroj, kiuj ellaborus por la grupoj *interesajn programojn,* tiajn, kiuj povas altiri la anojn. La plej sukcesajn el tiuj programpreskriboj oni devus interŝanĝi internacie, do fari ilin internaciaj klubvivigiloj; tiun interŝanĝon povus aranĝi la komisiono de UEA. Fine la literaturo povus ankaŭ *aktivigi* la klubanojn: ili devus deklami poemojn, reciti prozon, ludi unuaktaĵon (ekz-e de Baghy aŭ de Marjorie Boulton). Nenifaraj, krokodilantaj klubanoj baldaŭ ĉesas viziti la klubejon, la aktivigitaj, male, persistas. En la iama *Rondo de Baghy* la rondanoj sopire atendis la tempon de la proksima kunveno; ties sekreto estis, ke li sciis *aktivigi* la anojn.

b) La E-ajn *gazetojn* oni devus peti, ke ili okupiĝu pli multe pri la E-aj libroj. La anemiaj recenzoj, kiuj aperadas kun pedantaj riproĉoj kaj ŝablonaj laŭdvortoj, nemulte utilas, ĉar ili ne vekas la intereson de la leganto kaj misagordas la aŭtoron. Tiom pli, ke la kompatinda novelisto aŭ poeto devas kontenti je tiu magra nutro: plu neniam lia verkaĵo estos menciata kaj lia vivoverko mortos kune kun li. Kiu ja pritraktas la verkaĵojn de Hohlov, Emba, Adamson, Newell kaj aliaj? Oni devus fari regulo, ke la gazetoj dediĉu lokon, proporcian al sia amplekso, por literaturaj studoj kaj eseoj (studetoj, eseetoj). Tio utilus ankaŭ la gazetojn mem, kiuj ne malofte estas dezerte seninteresaj.

4. Grava kaŭzo de la plorinda libro-debito estas, ke la *nivelo de la lingvoscio* inter la esperantistoj *estas malalta.* Parte la lingv-instruistoj kulpas pri tio: ili tiom emfazas la eksterordinaran facilecon de la lingvo, ke iliaj lernantoj kredas, ke per la kurso ili jam lernis ĝin perfekte, kaj kiam ili, komencante legi, ne komprenas ion, ili seniluziiĝas kaj dizertas. Tial la plej grava tasko estas, kiel Kabe diris siatempe, ke *la esperantistoj lernu Esperanton.* Krom la perfektigaj kursoj, oni devus uzi por tio ankaŭ la *grup-kunvenojn,* por ke ili fariĝu lingvo-lernejoj, „altaj skoloj" de la lingvo. Por tio oni devas ellabori tiajn metodojn de lingva perfektigado, kiuj estas ne nur efikaj, sed ankaŭ *amuzaj, altirantaj la membrojn.* Mi pensas pri verkoj kiel „Paŝoj al Plena Posedo" de W. Auld. Oni devas kunmeti similajn por diversaj bezonoj. La grupon povas kunteni nur simpatiaj, sugestiaj, lertaj gvidantoj kaj tiaj ne kreskas en ĉiu bedo, nek en ĉiu urbo; tamen, certagrade ili estas kompenseblaj ankaŭ per malpli taŭgaj, se ĉi tiuj havas je sia dispono *bonan materialon kaj lertan metodon:* ĉi tiujn do oni devas krei kaj nacie kaj internacie. Oni povus fari en la kluboj ankaŭ komunan legaĵon de „malfacilaj" verkoj (ekz-e: La Infana Raso, Sinjoro Tadeo, Shakespeare-, Baudelaire-, Heine-tradukoj, elektitaj orig. poemoj ktp.) kaj klarigi komune la lokojn, kiujn ne ĉiuj komprenis. Tiel ankaŭ la cent kelkaj neologismoj, kiuj en la lastaj 40 jaroj „inundis" la lingvon, ĉesus esti timigiloj; ilin lernus eĉ la recenzistoj de la gazetoj (certa recenzisto en 1969 riproĉis japanan aŭtoron pro la „invento" de la „nova" sufikso „eska", kvankam ĉi tiu sufikso jam troviĝas en la Suplemento de P. V., aperinta en 1953). Eble aliaj kapoj fulmos ankaŭ aliajn rimedojn por la florigo, vigligo kaj utiligo de la grupkunvenoj; estus bonege, se la kolektiva kaj eĉ internacia saĝo produktus multe pli ol mia povra unuopa cerbo.

Multajn aliajn rimedojn oni povus, fakte, ankoraŭ trovi por la pligrandigo de la debito kaj ebligo de libroeldono. Pro spaco-manko mi sole mencias kelkajn: persvadi *publikajn bibliotekojn,* ke ili aĉetu por si ĉiujn valorajn librojn E-ajn; *akiri mecenatojn, kiuj helpus eldoni librojn multekzemplere kaj malmultekoste; akiri subtenon de ŝtato por eldono de reprezentaj verkoj naciaj* (ekz-e de *Brand* de Ibsen en la brila traduko de *Haugen); varbi grandkapitalan entreprenon por eldono de E-aj libroj* (ni pensu pri la grandega utilo, kiun siatempe *Hachette* donis al ni per la eldono de verkoj Zamenhofaj kaj Kabeaj kaj aliaj). Ktp. ktp. — ni uzu nian kolektivan saĝon!

Kompreneble, ĉio ĉi estas nur pia deziro, se oni ĝin legos konsente, kun aprobaj kapbalancoj. Sed se ĝi povos efiki al unu aŭ kelkaj aŭ pluraj, komenci ion en la direktoj montritaj, aŭ eble en direktoj aliaj kaj multe pli bonaj, tiam ĝi ne estis vane elŝvitita.

Vilmos Benczik

Vespero sur la ponto

La ponto estis nesufiĉe lumigita, sed la spegulbildo de la ŝajne vibrantaj urbaj lumoj en la akvo estis vere grandioza. La distanco filtris la bruon de la veturiloj; kompare al la stratoj de la centro ĉi tie regis silento. Sinjoro Rama ĝuis la trankvilon, sed ne enuis: la krispanta akvosurfaco kun neelĉerpebla inventemo kreis ĉiam kaj ĉiam novan kaj neripeteblan kombinon de la respeguliĝantaj lumpunktoj.

Sinjoro Rama estis amiko de la pontoj. Li konis preskaŭ ĉiujn en Eŭropo, almenaŭ en la ĉefurboj. Lia profesio lin devigis multe vojaĝi, kaj, kvankam lia sanstato postulus trankvilon, li ĉiam malakceptis la proponojn de la direktoraro pri posteno pli kvieta. Se oni malofte estas hejme, malpli oni sentas la mankon de vera hejmo. Dum la eksterlandaj vojaĝoj ankaŭ por la vesperoj troviĝis iaj profesiaj devoj — oficialaj vespermanĝoj ktp — kaj se foje-foje li havis liberan vesperon, li pasigis ĝin en parkoj, aŭ — plej ofte — sur iu ponto, rigardante la profundan, ĉiam ŝanĝiĝantan akvon.

Liaj pli junaj kolegoj — kaj el lia aĝo sekvis, ke ĉiuj liaj kolegoj estis pli junaj — konatiĝis kun la nokto de la fremda urbo, sopirante je aventuroj ekscitaj. Eĉ se li emus kuniri, dum tiaj vagadoj li estus superflua. Sed neniu lia ero deziris partopreni en tiaj vagadoj. Li preferis la pontojn.

En la urbo T. li estis la unuan fojon. Jam la unuan tagon li rimarkis tiun ĉi ponton, kaj eĉ en la taga lumo — kiu malice forprenas la sorĉon kaj ĉarmon de ĉio — ĝi kaptis lian atenton. Senpacience li atendis la unuan liberan vesperon kaj venis ĉi tien. Ĝi ne trompis lin. Ĝi elspiris mirinde unikan atmosferon: sinjoro Rama sentis sin volupte malpeza, kvazaŭ li estus elprenita el la materia mondo, tamen sentanta ĉion.

Li levis la rigardon kaj turnis sin, ĉar liaj membroj iom torporiĝis: la panoramo kaj la pensoj tiel okupis lin, ke eble jam duonhoron li restis senmova. Surprizite li rimarkis, ke ĉe la alia rando de la ponto, preskaŭ samvice kun li, staras junaj virino kaj viro. Certe ili alvenis dum li estis droninta en la pensoj, ĉar antaŭe li vidis neniun. En la mallumo, kiun mildigis nur kelkaj strange malfortaj lampoj, estis malfacile konstati ilian aĝon, sed pro io ŝajnis al li, ke ili ankoraŭ ne trapasis la dudekan. La gejunuloj staris man-en-mane, per la alia mano apogante sin al la parapeto kaj silentis.

Sinjoro Rama ĝojis, ke ili ne interkisadis, nek pepetis karesajn vortojn unu al la alia. Li sentis ian de profunde venantan naŭzon ĉeesti alies intimadon, eĉ en kinejo lin ĝenis tiaj scenoj. Li ne estis pruda, li ne kondamnis la gejunulojn, kiuj kisas unu la alian en alies ĉeesto, li simple nur ne ŝatis ĉeesti. Nun tamen la junulo diris ion al la knabino, tre mallaŭte, ĉar malgraŭ la proksimeco li ne komprenis. La knabino komencis ridi. Ŝia voĉo konfirmis la supozon de sinjoro Rama: laŭ la voĉo ŝi estis eble deksep-jara. Ŝia voĉo estis freŝa, ĝi impresis iel nematura, tamen por sinjoro Rama ĝi sonis agrable. Ŝi ridis ne laŭte, sed mirinde longe. La songutoj de ŝia rido disperlis al ĉiu direkto, iom post iom ili kvazaŭ plenigis la malplenan spacon super la rivero kaj la oreloj de sinjoro Rama soife kaptadis kaj englutis ĉiun soneron.

Post iom da tempo la knabino eksilentis kaj serioztone sin turnis al la junulo. Sed antaŭ ol sinjoro Rama povus noti la postrestantan malplenon, la arĝentsonora rido rekomenciĝis; nun jam ili ridis kune. La voĉo de la junulo estis malpli agrabla — almenaŭ por sinjoro Rama ŝajnis tiel — tamen ĝi efikis iel kompletige. Por suprajema aŭskultanto la rido ŝajnis apenaŭ modulita, senenhava. Oni ne povis eĉ konjekti, ĉu ili ridas pri ŝerco, pri iu konkreta persono, aŭ simple ĝi estas elŝpruco de la nebremsebla vivoĝojo, sed sinjoro Rama sentis, eĉ sciis certe, ke ĝi esprimas nemiskompreneble ion konkretan kaj sendube gravan, sed ne en lia ondolongo. Konstatinte tion, li ne penis deĉifri ĝin, prefere li transdonis sin al la pasiva perceptado, li sentis, kvazaŭ la inundo de la rido lin lavus pura.

Li ne sciis, kiom da tempo pasis, kiam el la stranga tranco lin vekis abrupta silento. La knabo kaj la knabino rektiĝis, kaj kun hororo li rimarkis, ke ili ambaŭ havas elartikiĝintan kokson. Li tuj sobriĝis, la sorĉo de la rido forflugis dum momento kaj li sentis en si mordan malplenon. En lia cerbo estis naskiĝanta ia hibrida penso de riproĉo kaj kolero pro la kruela trompo — li sentis sin hontige trompita — kiam la gejunuloj man-en-mane sin klinis sur la parapeton, puŝis sin per la piedoj kaj post sekundo li aŭdis la ekplaŭdon de la akvo . . .

Lia korpo rigidiĝis pro la konsterno, sed tio daŭris eble nur onojn de sekundo. La deviga sobreco venkis, kaj li ekiris kun sia maksimuma rapideco al la proksima bordo, sed post kelkaj sekundoj li vidis starti savboaton kaj malrapidigis siajn paŝojn. La kelkaj paŝoj, faritaj rapidritme, lin lacigis tiel, ke li devis halti por kelkaj momentoj. En sia dekstra kruro li sentis svenigan doloron, sed li superregis ĝin kaj marŝis plu. Kiam li atingis la bordon, jam multaj homoj staris tie. Policano klopodis malhelpi tumultiĝon. Sinjoro Rama demandis lin, kio okazis.

MIHÁLY VÁCI

SEN TITOLO

Ĉar ni estas solope, ĉar ni estas multope,
ĉar ni volas esti solope, ĉar ni timas solope,
ĉar estas multa laboro, ĉar estas nul serioza laboro,
ĉar estas multaj taskoj, ĉar ni ne scias, kio la tasko,
ĉar ni laboregas, ĉar ni nenion faras,
ĉar estas tiom da farendo, ĉar nenie estas la faro,
ĉar tiel multa estas nia tempo, ĉar tiel poka estas nia tempo,
ĉar jam sufiĉas al ni la vivo, ĉar ni timas la morton,
ĉar ni satmanĝegis, ĉar granda estas la malsato,
ĉar ni serĉas iun, ĉar ni perdis iun,
ĉar tiel multe ni scias, ĉar nenion ni scias,
ĉar necesus ion konfesi, ĉar necesas ion sekreti,
ĉar necesus ion demandi, ĉar necesus ion respondi,
ĉar ni kredas ankoraŭ ies ekziston, ĉar ni ne kredas ies eblon de ekzisto,
ĉar nenie troviĝas, kion ni serĉas, ĉar ni serĉas ja nenion,
ĉar ĉiuj kune ni ne scias, kio estas, kion ĉiuj ni bezonus,
ĉar eĉ tion ni ne scias, ĉu vere ni bezonas ion ajn,
ĉar ni strebas, batalas, sopiras pri nenio.
Ĉu la homaro bezonas ion vere?
Ĝi nun konstruas ja la stadionojn de sia futuro,
kaj la grandaj magazenoj de ĝiaj stomakoj estas plenplenaj por jarcentoj,
kaj ĉar tio ĉi mankas kaj ĉar tio ĉi ekzistas,
kaj ĉar oni satas kaj ĉar oni malsatas,
kaj ĉar oni sin savas reciproke kaj sin ekstermas reciproke,
kaj ĉar estas sensanga mondmilito, kaj ĉar estas sanga mondpaco,
kaj ĉar riĉa la homaro, kaj ĉar mizera la homaro,
kaj ĉar ĝi vivas en ordo, kaj ĉar ĝi vivas en murda ĥaoso,
kaj ĉar egale, kial, kiam kaj kie, kaj kio estas, kaj kio estos,
solope tiom multaj, en tia nemezurebla amaso,
ĉiam solope, ĉiam kune, ĉiam unu kun la alia,
ĉiu kun ĉiu, kontrau ĉiu.
kune, unu kun la alia, unu kontraŭ la alia.

Trad.: *K. Kalocsay*

Mihály Váci (1924—1970). poeto, Kossuth-premiito. Konscie engaĝita poeto, kun pura, sincera voĉo, pasia amo al la agema homo. En siaj lastaj poemoj ofte li senmaskigas kaj vipas fenomenojn, kiuj malfaciligas la evoluon de harmonia interrilato inter individuo kaj kolektivo.

— Du senzorgaj malfeliĉuloj falis en la akvon . . . „Sed ili saltis" — li estis kontestonta, sed ĝustatempe li mordis la langon. (Ankoraŭ longe li hontis, pensante pri sia intenco diri tion al la policano — li ne sciis kial.)

Li turnis sin kaj foriris de la grupo de la scivoluloj. Dum longa tempo li marŝis sen atento pri la direkto. Liaj piedoj doloris, sed la konfuzaj pensoj, svarmantaj en lia kapo, forgesigis al li la doloron. La kelkminuta sobreco forflugis, kaj li aŭdis reeĥi tiun ridon ne nur en la oreloj, sed en ĉiu ero de sia korpo. Tiu mistera rido nun kvazaŭ klariĝis al li kaj tiu penso frostotremigis lin. Li levis la kapon por forskui la koŝmaron kaj mire li konstatis, ke li estas antaŭ sia hotelo. Kun aŭtomataj movoj li prenis la ŝlosilon kaj iris al sia ĉambro. Malfermis la pordon kaj kelkajn minutojn hezite staris tie, poste iris al la ŝranko, verŝis por si konjakon. La nekutimata forta trinkaĵo pikis al li la gorĝon. Li sidiĝis sur la litrando. Post kelkaj minutoj li sternis sin per la tuta korpo sur la lito kaj kun rezigna rideto komencis observadi sian paralizitan dekstran kruron.

panoramo

Ekspozicio nomata „Historio de nia folklora arto" *malfermiĝis en la Palacmuzeo Budapeŝta. Por la ekspozicio oni elektis pli ol mil objektojn el la kolektaĵo de la Etnografia Muzeo.*

La ekspozicio de la hungara folkloro *montras ties evoluon ekde la 9-a jarcento ĝis la fino de la 19-a. Admirindaj popol-artaĵoj: skulptaĵoj, vazoj, brodaĵoj parolas pri la arta fantazio de la hungara popolo. La riĉmateriala ekspozicio restos malfermita dum pluraj monatoj.*

Unuafoje oni prezentis hungaran teatraĵon en la Egipta Araba Respubliko. La studio-teatro de *Egipta Verkista Federacio* metis en sian programon la unuaktaĵon „Bősendorfer" de *Ferenc Karinthy,* filo de la granda hungara Esperantema verkisto *Frigyes Karinthy,* de kiu lasta pluraj verkoj (Morgaŭ matene, Vojaĝo en Faremido, Norda Vento) aperis ankaŭ en E-o.

Tiu „100-seĝa teatro" en Kairo estis fondita en 1968; oni povas ĝin karakterizi kiel modernan eksperimentan scenejon. Prezentante eksterlandajn dramojn, ĝi klopodas liberigi la araban teatro-kulturon disde ties heredita izoliteco. La fideluloj de la nova teatro varbiĝas el verkistoj, artistoj, inteligentuloj, junaj studentoj.

En departemento Borsod oni tenas registritaj 200 arbojn de Metuŝelaĥa aĝo, kiel raraĵojn. El ili pli ol cent estas oficiale defendataj. La plej alta estas pedunkla kverko ĉe vilaĝlimo de Ziliz, aĝanta, laŭ la opinio de la botanikistoj, proksimume mil jarojn. La „prakverko" ĉi-jare denove disvolvis siajn foliojn.

En Budapeŝto la konferencon de la Internacia Federacio de *Lektoroj de Vivantaj Lingvoj,* daŭrantan preskaŭ unu semajnon, partoprenis, krom 350 hungaraj lingvistoj kaj lektoroj, 160 delegitoj el 19 landoj.

Internacia *poŝtmark-ekspozicio,* aranĝita de la Landa Federacio de Hungaraj Filatelistoj, malfermiĝis septembre en Budapeŝto. Krom Hungario, pli ol 700 ekspoziciantoj el 26 landoj sin anoncis, sed inter la kadroj de la 3500 ekspoziciaĵoj sole la plej bonaj, elektitaj kolektoj povas partopreni Oni prezentos ankaŭ poŝtmarkojn, kiuj rilatas al ĉasado kaj fiŝkaptado.

Unusemajnan internacian fremdultrafikan *konferencon oni tenis en Budapeŝto, kien Belgio, Britlando, Ĉeĥoslovakio, Franclando kaj Svislando sendis 25 fremdultrafikajn samfakulojn. La partoprenantoj aŭskultadis specialajn raportojn pri la situacio de la hungara fremdul-trafiko kaj partoprenis varian landveturadon.*

Franclande kreskas la interesiĝo pri *hungaraj filmoj.* Subtenate de *Franca Federacio de Filmkluboj,* la Instituto de Kulturaj Interrilatoj kaj la „Hungarofilm" prezentis laŭvice en diversaj filmkluboj hungarajn filmojn. Oni invitis Franclanden la reĝisoron Stefano Gaál, kaj ĉi tiu partoprenas en pluraj urboj la diskutojn post projekciado de la filmoj. André Rieupeyrout, prezidanto de la Franca Federacio de Filmkluboj, deklaris, ke la francaj samfakuloj alte taksas la plej novajn hungarajn filmojn, kaj esperas, ke ilia prezentado en la filmkluboj helpas en Francujo ankaŭ la debiton de tiuj filmoj.

panoramo



Laŭ la Hungaria-Tunizia *kultura laborprojekto, oni aranĝis en Tunizo* hungaran kulturan semajnon, *en kies varia programo prezentiĝis ankaŭ nia film- kaj afiŝ-arto. Aparta ekspozicio raportis pri la 25-jara evoluo de nia patrujo. Niaj grafikistoj donis bonan resumon pri la hungara grafik-arto. Okaze de la Bartók-jubilea jaro, oni aranĝis ekspozicion pri la vivo kaj laborado de Béla Bartók. La Tuniza radio dissendis kvin programojn kaj ankaŭ plurajn koncertojn konekse kun la hungara semajno.*

Pri la *Mondekspozicio de Ĉasado,* tenata en Budapeŝto, aperis artikolo en la gazeto „The East African" (Nairobi). La ĵurnalisto, Michael *Parry,* skribas, ke „en Eŭropo la plej bona teritorio por ĉasado estas Hungario, ĉar tie la ĉasbestaro estas abundega".

Vizitante Hungarion uzu la servojn de

IBUSZ

la plej malnova vojaĝagentejo de la lando.

Hotelĉambro-rezervado
Aranĝo de pasport-kaj enirvizo-afero
Aĉeto kaj vendo de eksterlandaj valutoj
Biletoj por aeroplano, ŝipo kaj trajno
Ekskursoj kaj programoj
Urbospektadoj
Servo de fremdulgvidantoj kaj interpretistoj
Senpaga konsildona servo en vojaĝaferoj

Oficiala vojaĝagentejo de la Mondekspozicio de Ĉasado

IBUSZ-AGENTEJOJ EN ĈIUJ URBOJ DE LA LANDO

REPREZENTEJOJ:

ĉe limstacioj en hoteloj kaj ripozlokoj

VI ŜPARAS MONON KAJ TEMPON UZANTE NIAJN SERVOJN

IBUSZ agentejoj eksterlande

Amsterdamo	Londono	Romo
Berlino	Moskvo	Sao Paulo
Bruselo	Otavo	Stokholmo
Frankfurto	Parizo	Vieno
Kolonjo	Prago	

K. Kalocsay

Diskuteto pri la apostrof-ekstermo

En kelkaj poemtradukoj, tentate de la senakcidenta ekzemplo de *Vilho Setälä*, mi ellasis la apostrofojn ĉe la elizio de lao-finaĵoj kaj eĉ klopodis tion pravigi en noto. Plurajn reagojn pri tio ni ricevis: unu entuziasme aproban, eĉ en versoj, de *A. Logvin*, kaj du malaprobajn. *Sz. Kazimierz* skribas: *Se ni akceptos, ke licas skribi simple tabl, hom, dom, tiam ni devas forstreki la Fundamentan principon, ke ĉiu substantivo finiĝas je -o. Do, E-e la substantivo povas havi ian ajn finaĵon! Kaj tion sro Kalocsay asertas esti ne kontraŭfundamenta! G. Csüllög* estas ankoraŭ pli severa: *„Kion Kalocsay provadas, tio estas nepardonebla peko kontraŭ la reguleco, la strukturo, la valoraj rekonigiloj de la lingvo. Se al li pli plaĉas komplet- aŭ nul-apostrofado, li reiru al tiaj naciaj kaj internaciaj lingvoj, kiuj ne ligas al li la manojn... Al mi ne plaĉas, ke per mia abona mono mi honorariu pro la diletantista duonapostrofado al Kalocsay, Tárkony, J. Tóth aŭ kiu ajn!"* Tria malaprobo aperis en Heroldo de E-o, el la plumo de samideanino *Minnaja*.

Eble oni provu priparoli la aferon objektive kaj senpasie.

Sz. Kazimierz skribas, ke la o-finaĵo de la substantivoj estas Fundamenta principo, kiun ne licas rompi. Tamen, permesante la elizion, la Fundamento mem rompas tiun principon. Ĝi ebligas, vere, anstataŭigi la eliziitan finaĵon per apostrofo. Kial? Por ke ne okazu konfuzo. La demando do estas, ĉu ne ekzistas kazoj, en kiuj *ne povas* estiĝi konfuzo? Jes ja, ekzistas tiaj kazoj, eĉ tre multaj! La *strukturo* de la lingvo (kiun emfazas *G. Csüllög)* estas nome tia, ke la plej multaj substantiv-radikoj nudaj nedubeble montras per sia nudeco la elizion de la o-finaĵo, tiel same nedubeble, kiel la apostrofo. Ĉu ekzistas esp-isto, eĉ komencanto, kiu ne rimarkas tuj, ke en *temperament, rajdistin, konat, vizit, tribut, diferenc, projekt, protest, arbar, trinkaĵ, enterig, karambol, proksimiĝ, diligentul* ktp. ktp. ne estas metita la apostrofo, do oni devas ĝin *pense* kompensi, kaj akcenti la lastan silabon de la radiko?

Tamen, ekzistas nudaj radikoj, kiuj estas konfuzeblaj kun deklinaciaj aŭ konjugaciaj formoj: ekzemple *timon'* sen apostrofo estas konfuzebla kun la akuzativo *timon*. La demando estas do, ĉu oni povas fari regularon, kiun observante oni povas eviti tute sekure ĉian konfuzon.

Jes, jen la regularo:

Apostrofon oni nepre devas meti

1. Ĉe unusilabaj vortradikoj post min', vin', lin', sin', ĉar', kaj', por'.

2. Ĉe plursilabaj radikoj post tiuj, kiuj finiĝas je iu E-a finaĵo, t.e.

a) je iu ajn *vokalo;*

b) je la konsonantoj *-j, -jn, -n, -s,* se ĉi tiujn antaŭas vokalo; esceptoj tamen estas *-in, -es, -ej, -uj, -un.*

Per tiuj reguloj oni povas eviti kun absoluta sekureco, ke ekz-e la substantivoj *bala', pere', malaj', semajn', amas', palis', statu'* estu miskomprenataj kiel *bala, pere, malaj, semajn, amas, palis, statu.* Sed ne nur tion! Ankaŭ tion, ke *hero', naci', hoboj', kolos', kompas'* kaj similaj ŝajnu deklinaciaj aŭ konjugaciaj formoj de nekonataj vortoj, kaj oni serĉu en la vortaro la neekzistantajn vortojn *hero, naci, hobo, koli* aŭ *kompi.*

Kompreneble, tia ŝparado pri apostrofoj estas iom malsimpla tasko kaj postulas atentemon, sed tio ne ŝarĝas la legantojn, nur la poetojn. Kaj eĉ nur la poetojn „ŝparemajn", ĉar la Fundamento permesas ja malŝpari, meti apostrofojn nenecesajn (ekz-e en *subiris la sun).*

Koncerne la argumentadon, kiun *G. Csüllög* nomas „ventrefalinta", ke nome la Fundamento tiel same nur *permesas,* sed ne postulas la apostrofadon kiel la elizion de la o-finaĵo, nu, oni povas diri, ke ĝi estas misinterpreto de la tiea teksto. Sed oni devas allasi, ke la teksto oni *povas* tiel (mis) interpreti. Kaj, kun iom da fantazio, oni povas eĉ supozi, ke Zamenhof *intence* faris la tekston tiel interpretebla, pensante ke iam oni rimarkos kaj fruktuzos tiun interpreteblecon, ĉar la *matura* E-o ne bezonos plu tiun balaston da apostrofoj, kiu estis bonvena en la komencaj tempoj.

Principe: mi ĉiam alte taksis niajn fortojn konservativajn, kiuj gardas la stabilecon de la lingvo. Sed se ili *tro* funkcias, ili povas malutili per tio, ke ili malhelpas eĉ etan, suprajan (kaj bonvenan) poluradon de la lingvo. Anstataŭ tuj kapti klabon, do estus eble pli konsilinde translasi la aferon al la imito aŭ ignoro de la „libera evoluo".

Kiu povus aboni por mi Hungaran Vivon?

Tian demandon metas, kaj petas pri la publikigo de sia anonco kaj pri la komplezo de bonvoluloj, ĉar ili mem ne povas aboni nian revuon, kun kora antaŭdanko.

Vytas MAT—OSAITIS, 44-jara farmaciisto. Raseiniai, Vaistiné 100, Lit. SSR-Sovetunio. Koresp. pri fotoarto, kolektas p-markojn (uzitajn) kun temoj: arto, faŭno, flaŭro, sporto.

M. RUCZ, Mukaĉevo, str. Lobaĉevskij 19. Sovetunio. Zakarpatskaja.

Lajos Nagy

La sentalenta verkisto

Tre eĉ treege li estimas la literaturon. Li estas admiranto de la verkistoj. Li legas multe, li scias pri ĉiu verko, pri ĉiu verkisto. Se li mem estas pala kaj malgrasa, tiam la kompatindan Dostojevskij li rigardas dio. Se li mem estas ruĝa kaj grasa, tiam li kredas, ke Mikszáth estis pli saĝa homo ol Pasteur aŭ Edison, kaj se li volus, ankaŭ li eltrovintus la elektran arklampon. Se li estas ruĝa kaj grasa, — kaj tamen Dostojevskij estas lia dio, ĉi tio estas la plej malbona, ĉi tio estas jam la superlativo. Kompreneble Napoleonon li ne rigardas granda homo, ĉar se li estas duone sentalenta, tiam li ne kuraĝas lin opinii granda; se li estas tute sentalenta, tiam li ne povas al si enkapigi, kiel oni povas trovi granda tian sentaŭgulon kiel Napoleono, ordinaran generalon, aventuriston, aĉan imperiestron. Se oni ludas liter-ludon, nome tion, ke oni devas skribi la nomon de famaj homoj komenciĝantan per iu donita litero, ekzemple per *F*, kaj kiu skribos la plej multajn en dek minutoj, tiu gajnos, — tiam li komencos ĝin per Flaubert, daŭrigas per Firdusi, kaj el kvindek li skribos kvardek verkistojn, sed eĉ koni ne volas nomojn kiel Fulton. Li scias, kia estas la madrigalo, kaj en provinca gazeto jam aperis de li unu novelo aŭ unu poemo. Ankaŭ li loze leĝeras en sia civila okupiĝo. Se li estas riĉa, — li estas plej ofte tia — tiam li volus esti malriĉa. Kiel talentulo la dikpoŝan kapitaliston, tiel li envias la poeton, kiu vespermanĝas kafon. Li eĉ imitas ĉi tiun: havante plenan monujon li vespermanĝas kelkfoje nuran kafon, prove ĉu tio eble tamen helpos. Ĉar li faras ĉion por sukcesi eniri en la literaturon, — li estas preskaŭ tiel granda malĝojo por siaj gepatroj, kiel la vera talento. Li konatiĝas kun verkistoj. Plezure li pruntedonas al ili monerojn. Li petas aŭtogramon. Li aĉetas libron, kaj ĝin dediĉigas. Li kolektas la librojn, sed aĉetas prefere senvalorajon en parada eldono ol majstroverkon. Ĉar li volas ja sin ornami per la literaturo. Li dezirus ĉemeti kelkfoje ĉifonan poeton al sia ĉapelo kaj tie porti lin kiel bukedon. La ekskluzivajn poetojn li observadas de malproksime, li scias pri ili, ĉu ili trinkas la teon kun rumo aŭ kun citrono, ĉu ili amas ĝin kun multa aŭ malmulta sukero, — li kolektas la indikojn. Li enmiksiĝas en la karto- aŭ domenoludon de la amikiĝemaj verkistoj, li sukcesas eniri ilian familion, vizitas ilin, sendas mankisojn por ŝiaj sinjorinaj moŝtoj, kaj vigle interesiĝadas, kion faras la eta Gabi, — kaj li atendas la okazon, ke li deklaru: kara majstro, ankaŭ mi „kulpis" ion, mi estus tre danka al vi, se vi ĝin tralegus, treege min interesus via opinio. Li ne scias do, ke la veran talenton ne interesas eksterordinare la opinio de alia kara majstro, maksimume lin tre ĉagrenas, se tiu opinio ne estas nepre favora. Se pri nenio li sukcesas, tiam li eldonas libron propra-koste, sed li skribigas al ĝi antaŭparolon per iu verkisto. Poste li distribuas kaj disŝutas honorekzemplerojn. Sed li demandas eĉ dekfoje: ĉu vi ĝin jam legis? Fervore, eĉ en fiakro, li portadas siajn librojn al la gazetoj, kaj gvate atendas, kion oni skribas pri li. Li estas preta ellitiĝi je la sesa, por ke kiam oni portas la gazetojn en la kafejon, li jam tie gvatu pri la recenzoj. Li eltrančas kaj kolektas la recenzojn, engluas ilin en kartonpaĝan kajeron, la laŭdajn frazojn — ĉiam troviĝas tiaj — li substrekas per ruĝa krajono kaj laŭtlegas ilin al siaj konatoj. Jam la titolo de liaj libroj estas malbona. Se ĝi estas poemvolumo, tiam ĝia titolo estas: *Cejanoj;* se ĝi estas novelvolumo, tiam: *Embuske;* se ĝi estas romano, tiam: *Tabajdy.* Terure! En okazo ankoraŭ pli peza la ĉefheroo nomiĝas Bloch, kaj pri sia ĉefheroo li skribas: *„Maria estis unu el tiuj virinoj . . ."* Se eĉ la libro prokraste eldonita ne sufiĉas, tiam la sentalenta verkisto aĉetas gazeton, aŭ almenaŭ fariĝas ties akciulo, kaj de tiam li estras aŭ redaktas. Nun jam apenaŭ troviĝas savo kontraŭ li. Nun jam aperas liaj verkajoj. Nun jam sentalentulo volas havi por sia gazeto nur eminentajn nomojn, nur Ambrus, Babits, Molnár, Bródy — kaj sin mem, — la ceteraj estas kamparaj trupoj.

Mi ne kredas, ke iam ajn iu redaktis literaturan gazeton en Hungarujo, kiu povis kontraŭstari al tiu ĉi tipo kun tia facileco, kiel Ernő Osvát. Li estas flankvoje nealirebla, li estas nevenkebla per ruzaj cimedoj. Se li opinias la verkiston senmerita, tiam ne utilas la interkonatiĝo, nek la amikado, nek la domeno, nek la biliardo, nek eĉ la intenca malgajno en kartludo, nek la flatado, eĉ malpli la atako; mi kredas, ke verkajon trovintan senvalora li ne aperigus eĉ por unu miliono. Mi kredas, ke tiun ĉi rezistan forton, en kiu al li neniu estas komparebla, li ekzercadas pasie.

Trad.: *Krisztina Nyitray*

Kompletigu la jarkolektojn de Hungara Vivo!

Multaj niaj legantoj demandis letere kaj persone, kiel kompletigi la jarkolektojn de H. V.? Ni havas ankoraŭ malnovajn ekzemplerojn, kvankam ne el ĉiuj numeroj; ili estas mendeblaj de Hungara E-Asocio, Budapest VIII. Kenyérmező u. 6. Hungario. Prezo de unu ekzemplero estas: el la jaroj 1964—1968: 2 forintoj (0.20 dolaro), el 1969: 5 forintoj (0.40 dolaro), el 1970: 8 forintoj (0.50 dolaro). Poŝtkosto de unu ekzemplero: 1 forinto, eksterlande 0,20 dolaro aŭ egalvaloro alivaluta.

Intervjuo kun profesoro F. Bruno Straub ĉefdirektoro de la Biologia Centro en Szeged

La duan de aprilo eklaboris en Szeged la Biologia Centro de la Hungara Scienca Akademio. Antaŭ la inaŭguro ni vizitis profesoron Straub, ĉefdirektoron de la instituto, vicprezidanton de la Akademio. Li akceptis nin afable kaj respondis kompleze niajn demandojn.

— *Kio estas la ĉefa tasko de la instituto?*

— Okazigi bazajn esplorojn biologiajn sur moderna nivelo, kun koncentrado de fortoj spiritaj kaj materialaj (esploristoj, instrumentoj), kun rekte praktikaj motivoj kaj valoro. Ni volas helpi la *agrokulturon* (en selektado kaj nutraĵindustrio), kaj la *medicinon* (en industrio de medikamentoj). Ni bezonas personan kontakton kun eksterlandaj esploristoj, ĉar oni plu ne povas „sin vivteni" el la legado de fak-revuoj. Tiam oni devas ekscii la penson de la aliaj, kiam ĉi tiuj ankoraŭ pensadas pri la afero, kaj ne tiam, kiam la preciza kaj logika artikolo jam aperis presita, unu jaron post la ekpenso. Ni havas 185 laboratoriojn kaj el ĉi tiuj 35 atendas gastojn, por kiuj ni havas ankaŭ gastroĉambrojn.

— *Ĉu la plej bonaj „kapoj" ne forŝiriĝos de la instruado pro sia esplora laborado?*

— Niaj esploristoj prelegos en la universitatoj de Szeged, krome kelkaj el la studentoj ricevos eblon pasigi ĉe ni sian ekzercan tempon, kaj kelkaj povos presigi ĉi tie sian faklaboraĵon. Nia instituto estas baz-esplora instituto, kaj tial ni rigardas nia tasko la t.n. „postgradualan" (postgradan, supergradan) instruadon de la junaj fakuloj; kiel legi kaj taksi la fakliteraturon, kiel alproprigi metodojn, lanĉi problemojn, kiel taksi ĝuste siajn proprajn rezultojn — jen kion ni volas al ili instrui.

— *Kiel la Centro estos organizita?*

— La Centro konsistos el kvar institutoj: el la Biokemia, Biofizika, Genetika kaj Fitonomia Institutoj. Ilia kunlaboro celas la intersciencan komunikiĝon, kiu hodiaŭ estas la nura eblo akiri rezultojn en la biologio.

— *Ĉu ni povus ion aŭdi pri la planitaj esplortemoj?*

— Mi povas paroli, kompreneble, nur pri temoj komencataj. Unue mi mencias, ke nia instituto aliĝas al unu el la ĉefaj esplordirektoj de la Akademio: al la *bio-regulado*. Ĝi studos do la reguladon de la *enzim-funkcio* kaj *gen-funkcio*, la efikon de la *hormonoj* kaj la mekanismon de la *imun-reakcioj*. Nia alia tereno estas la biofiziko de la *fotosintezo*, speciale la problemoj de la *transmetiĝo de energio*. Por la agrokultura esplorinstituto, okupiĝanta pri *tritikoselektado* ni faros *tritiko-genetikajn* observadojn. La fitonomistoj esploros la estiĝadon de la *virus-rezisteco* kaj ties interrilaton kun la metabolo de la nukleo-acidoj.

— *Se reveni al aferoj organizaj, per kio ni povus kompletigi la ĉi-koncernajn informajn?*

— Ĉe ni, unue en Hungario, laboros, kiel vicĉefdirektoro, ekonomo-administranto (tipo de „manager"). Tiel la esploristoj ne estos ŝarĝataj per administraj balastoj: ni volas elformi tian publikan spiriton, ke ili sentu respondecon pri didaktikaj, politikaj, — unuvorte sociaj problemoj, ke ili ne vivu izolite. Ni strebas, kompreneble, krei tian atmosferon, en kiu la homoj fartos bone. Ŝercforma punkto de nia statuto estas la „foiro de Sankt-Georga tago", kiam la junaj esploristoj povas, sen ia motivado, ŝanĝi laboratorion — kaj tiel ankaŭ ĉefon.

— *Viaj propraj sciencaj planoj?*

— En la Budapeŝta Biokemia Instituto — kiu estas propre la enzimologia sekcio de la Biologia Centro en Szeged, mi laboros ankaŭ plue pri la rolo de la *moviĝemo de la protein-strukturo en la enzim-aktiveco*. Eĉ la ekzisto de tia interrilato mem ne estas ĝenerale akceptita, sed mi havas ĉi tiun starpunkton.

— *Vi, kiel vicprezidanto de la Akademio, certe havas ankaŭ aliaj taskojn krom la organizado de la Instituto en Szeged.*

— Mi gvidis la komitaton, kiu ellaboris la sciencopolitikajn principojn de la Akademio, kaj mi estas la responsulo de la detala skizado de la ĉefa esplordirekto pri la *bioregulado*.

— *Mi demandus vin pri via socia agado, tiel ekzemplodona. Kiajn rezultojn vi sukcesis akiri en la Viena kunsid-serio, okupiĝanta pri ellaboro de garantia konvencio koncerne la kontrakton de atom-baro.*

— Jam antaŭ dek jaroj mi partoprenis unu Pugwash-konferencon, kiu protestis kontraŭ la atomarmado kaj atombombaj eksperimentoj. Mi ĝojas, ke ankaŭ nun mi povas efike kontribui al la solvo de la problemo. Kiel ano de la administra konsilio, mi ricevis vicprezidantan postenon; tio estas diplomatia sukceso por Hungario. La traktadoj sukcesis bone, la formulado de la konvencio estas tia, ke espereble ankaŭ la landoj ĝis tiam hezitantaj ratifos la kontrakton.

János Tóth

ENHAVTABELO

de Hungara Vivo 1961-1970

KUNMETIS LUDOVIKO KÖKÉNY

Multaj legantoj jam de kelkaj jaroj esprimis sian deziron, ke ni kunmetu enhavliston pri la dek jarkolektoj de nia revuo. Goje ni anoncas, ke la enhavlisto pretiĝis. Eĉ la redaktoroj mem mire konstatis, kiel riĉa trezorejo de la hungara kaj Esperanta kulturo kolektiĝis dum dek jaroj el la fervora, kapabla kaj talenta laborado de niaj verkistoj, poetoj kaj tradukistoj. Koregan dankon al ili, kaj same koregan dankon al niaj karaj abonantoj kaj legantoj! — Kelkloke ni ŝanĝis la titolon de la artikolo, por ke la leganto jam el la teksto de la titolo informiĝu pri la enhavo. Multfoje ni ankaŭ mallongigis la tekston de la titolo pro deviga ŝparado. La nomoj en parentezo estas tiuj de la tradukintoj, la familia nomo de la aŭtoroj staras antaŭe.

Artoj

Barczi Pál. — *Gergely.* 70/2.
Barta István. — *Farkas Éva* 65/4. — *Kökény* 70/4.
Csohány Kálmán. — *Gergely* 69/3.
Csontváry Tivadar. — *Újlaky* 63/3.
Derkovits Gyula. — *Lukács Ágnes* 64/4.
Dési Huber István. — *Lukács* 68/3.
Kass János. — *Juhász Ferenc* 69/1. *(Újlaky)*
Kisfaludi Strobl Zsigmond. — *Újlaky* 64/2.
Kun István. — *Szerémi* 64/3.
Lukács Ágnes. — *Fenyvesi* 70/4.
Medgyessy Ferenc. — *Újlaky* 62/1.
Mednyánszky László. — *Lukács* 67/4.
Munkácsy Mihály. — *Újlaky* 61/3—4.
Pásztor János. — *Lyka* 63/1. *(Újlaky)*
Pór Bertalan. — *Oehlmacher* 67/3. *(Tárkony)*
Szász Endre. — *Gergely* 69/4.
Szinyei Merse Pál. — *Lyka* 62/2. *(Reiber)*
Varsányi Pál. — *Kökény* 65/3.
Würtz Ádám. — *Gergely* 70/1.
Ybl Miklós. — *Újlaky* 64/3.
H. konstruarto de jarmilo. *Mátéffy* 67/4.
Ják, Zsámbék, Lébény. — *Mátéffy* 64/3.
Renesanco en Hungarlando. — *Mátéffy* 65/1.
Baroko en Hungarlando. — *Mátéffy* 68/2.
Vajdahunyad (Agrikultura Muzeo). — *Mátéffy* 63/2, 63/4.
Belarta Muzeo en Bp. — *Lukács* 66/1.
Nacia Galerio en Bp. — *Lukács* 66/2.
Szentendre, Parkmuzeo. — *Szathmári* 67/1.
Fotoarto (125 jaroj). — *Benczik Mária.* 67/1.
Afiŝarto de 1919. — *Gergely* 69/2.
Ekslibris-arto. — *Reisinger* 69/4. — *Semsey* 70/2.
Infandesegnaĵoj. — *Ingusz* 69/3.
Arto de Bp. post 1945. — *Gilicz Márta* 61/1.
Defendo de artobjektoj. — *Mátéffy* 70/3.
La h. arto kaj la int. kooperado. — *Hemberger* 70/2. *(A. K.)*
Teatra kaj muzika vivo. — *Szenes* 61/1. *(Somlai)*
Teatro de milionoj. — *Lóránd* 61/2. *(Kökény)*
La autobusoj de Thalia. — *Szenes* 61/3—4.
Heroaj tempoj de nia teatro. — *Toldi—Varga* 65/2. *(Kökény)*
Blaha Lujza. — Toldi—Varga 65/3. *(Kökény)*
Bajor Gizi Muzeo. — Toldi—Varga 66/3. *(Újlaky)*
Ruttkai Éva. — Lukácsy 69/4. *(Kökény)*
Teatroj de Budapeŝto. — *Nádasdi* 68/3.
Teatra kroniko — 70/3. *(A. K.)*, 70/4. *(KVK kaj P. B.)*
Balázs Béla, Filmkulturo kaj filmeduko. *(Kökény)* 64/4.
Kovács András, filmreĝisoro. — *(Kökény)* 69/1.
Bartók. — *Szabolcsi Bence* 61/3—4. *(Balkányi).* — *Lesznai* 64/3. — *Bácskai* 70/4.
Beethoven. — *Kökény* 63/4. — *Lesznai* 70/4.
Erkel Ferenc. — *Újlaky* 66/2.
Kodály. — *Nagy Zsuzsa* 62/4. — *Lesznai* 67/2.
Liszt Ferenc. — *Lesznai* 62/1.
Szigeti József. — *Gábor József* 64/1. *(Tárkony)*
Ungár Imre. — *Ruffy* 62/3. *(Balkányi)*
Muziko kaj eduko. — *Bódis Sylvia* 64/1.
Muzika edukado. — *Vígh Gábor* 69/2.
Muzikpedagogia renkontiĝo. — *Lesznai* 65/1.
La plej malnova orgeno. — *Lesznai* 67/3.
Komponistoj: Kadosa, Ránki, Szabó. — *Lesznai* 67/4.
Pianistoj: Fischer, Hernádi, Ungár. — *Lesznai* 68/1.
Muzikhistorio sur diskoj. — *Lesznai* 68/2.
Tri koncertoj de ŝlagrokantistoj. — *Nádasdi* 67/3.
Bp., urbo de la muzikaj konkursoj. — *Lesznai* 66/1.
Muzika vivo en 1919. — *Lesznai* 69/3.
Muzikaj semajnoj en 1968. — *Lesznai* 69/1.
Hamleto, opero de Szokolay. — *Lesznai* 69/2.
Kongreso de junaj muzikamantoj. — *Lesznai* 69/4.
Muzikaj sukcesoj ... — *Lesznai* 70/2.
Muzika vivo en Bp. — *Lesznai* 70/3.
Novaĵoj el la Bp-a Operdomo. — *Lesznai* 70/1.
Virina ĉambro-ĥoro. — *EFT* 70/4.
Hungaraj kantoj. — *Kalocsay* — 68/3.
H. popoldancoj. — *Kaposi Edit* 62/3. *(Újlaky)*
La h. popolarto. — *Kaposi Edit* 63/3. *(Mátéffy)*
H. popolkostumoj. — *Gilicz* 65/1. *(Újlaky)*
H. popolkantoj. — *Lesznai* 65/3.
Popolaj artoj. — *Gilicz* 65/4. *(Újlaky)*
H. popolkutimoj. — *Szabó Valéria* 69/4.
Arto de spaco-, lumo-kaj tempodinamismo. — *Major* 70/4. *(Fenyvesi)*

Historio, politika, paco

Antaŭen — *Kossa István* 61/1.
Hungarlando kaj KREH — *Apró Antal* 64/1. *(Kökény)*
El mia lando — *Baghy* 61/1.
Dobi István — 61/1. *(Kökény)*
Dózsa György — Kökény — 64/2.
„Blanka negro" k la ceteraj — *Békés István* 61/3—4. *(Bodó)*
Blažono popolrespublika — *Gilicz* 61/2. *(Mátéffy)*
Brigadmovado en Hungario — *Szerémi* 64/2.
La h. sindikatoj, ilia agado — *Brutyó János* — 63/3. *(Kökény)*
La sindikatoj por la socia progreso — *Füleki 61/3—4.*
Garasin Rudolf, la internaciisto — *Márkus Lajos* 67/4. *(Szalay)*
Hámán Katarina — *Szerémi* 61/3—4.
Liberigo de la „getto" — *Illés Béla* 65/2. *(Kökény)*
Internacio — Pottier k Degeyter 61/2. *(Kökény)*
Interrilatoj de Hungario — *Mihályfi Ernő* 63/4. *(Tárkony)*
Kádár János (Vivovojo) 61/3—4. — *Szerémi*
Kádár János (Parlamenta parolado) 62/1. — *(Balkányi)*
Kádár János (Parolado en MÁVAG) 63/2. *(Szerémi)*
Kállai Gyula: Hungario sur la vojo de prospero 64/2. *(Kökény)*
Károlyi Mihály — *Szerémi* 62/3.
Katolika eklezio nuntempe — *Erdei—Bodó* 62/4.
Reformita eklezio — kvarcentjara. *Farkas Éva* 67/4.
Kriminala kodo — *Nezvál* 62/2. *(Balkányi)*
Kvar jaroj en la politika vivo — *Szerémi* 63/2.
Liberecmilito 1848—49. *Gracza, Spira, Békés* 62/1. Komp. *Kökény*
Majo la 1-a (historiaĵo) — *Réti László* 61/2. *(Bodó)*
Marx — *Kökény* 68/4.
Militon, ĉu volis la h. popolo? — *Szenes Imre* 61/2. *(Kökény)*
Münnich Ferenc *Szerémi.* 61/2.
Okazis en 1918 — *Balkányi* 69/1.
Oktobra Socialisma Revolucio — *Kökény* 67/3.
Patriota Popolfronto — *Harmati Sándor* 62/1. *(Kökény)*
Persona proprajo en Hungario — *G. P.* 61/1. *(Mátéffy)*
Pionir-movado — *Szerémi* 61/3—4.
Pionira palaco en Bp. *Szerémi* 66/1.
Pionirfervojistoj — *Anka Éva* 67/3.
Romia imperio, memoraĵoj — *Mátéffy* 62/3.
Septembro, la l-a 1930. — 61/1. *(Botos)*
Socialista etiko (Dek ordonoj de...) — *Kökény* 61/3—4.
Stefano la I-a — *Kalocsay* 70/4.
Szenes Imre: Malfacila nasko. *(Tárkony)* 66/3.
Szenes Imre: Kiuj duafoje venas... *(Illéssy)* 68/3.
Szilágyi—Kádár: La deveno de la hungararo 68/1.
1945—1965 — *Szerémi* 65/1.
25 jaroj — *Berceli Béla* 70/1.
Printempo de 1945 — *Szerémi* 65/2.
1917 — Tiel komenciĝis — *Szerémi* 67/4.
Statuo (de l' libero) ekparolas — *Vadász* 65/2. *(Kökény)*
UNESCO — *Jóború Magda* 63/2. *(Újlaky)*
Virinoj (eminentaj) — *Szerémi* 61/1., 61/2.
Zalka Máté — *Szerémi* 61/2.

Pacmovado

Pacmovado — *Dezséry László* 61/1. *(Somlai),* 62/2. *(Újlaky)*
Int. E-a Virina Renkontiĝo en Budapeŝt — *Szerémi* 61/3—4.
La virinoj en la pacmovado — *Szerémi* 62/1.
Mondkongreso de Paco en Moskvo — *Kökény* 62/4.
Laborista internacieco — *Beckl Sándor* 63/1. *(Kökény)*
Por la paco en la atom-epoko — *Szerémi* 64/4.
Sinofera morto de Ĉunoŝin Juin — *Balkányi* 68/2.
Vjetnamaj ŝirmejoj — *Kende István* 68/3. *(Kalocsay)*

Urboj, landoj, regionoj

Aggtelek. — *Mezei.* 61/3—4.
Balaton. — *Mezei.* 61/1. — *Mátéffy* 66/2.
Balaton, Bazaltvulkanoj. — *Kovács Lajos* 68/1.
Budapest. — La nova vizaĝo de... *Szerémi* 61/2.
— La tago en... *Lukács Béla* 61/2. *(Emba)*
— Muzeo en Pesterzsébet. — *Csánki* 61/3—4. *(Nolipa)*
— Nuntempa gimnazio. *Balkányi* 61/3—4.
— Laboristaj hoteloj. *Emba* 62/1.
— Urbo de int. renkontiĝoj. — *Szerémi* 62/1.
— Romia muzeo. — *Rókás* 62/2. *(Nagy István)*
— Zoo. — *(Anghi Csaba)* 62/2. *Mátéffy*
— Zooparko. — *Avdeev—Najdin.* 63/1.
— Infana biblioteko. — *(Lukács Ágnes)* 62/2.
— Fortikaĵo. — *Toldi—Varga* 63/3. *(Mátéffy)*
— Báthory groto. — *Mezei* 63/3.
— Margaretinsulo. — *Toldi—Varga* 64/2. *(Mátéffy)*
— Gerharda monto. — *Toldi—Varga* 64/3. *(Mátéffy)*
— Banurbo Budapeŝto. — *Toldi—Varga* 64/4. *(Mátéffy)*
— Mozaikoj el historio de... *Mátéffy* 65/1.
— Elizabeta ponto. — *Mátéffy* 65/2.
— Ĝenerala priskribo. — *Fekete Gábor* 66/2. *(Tárkony)*
— Emke, subtera trapasejo. — *Nádasdi* 66/4.
— Loĝejkonstruado post la liberiĝo. — *Cseszkó* 67/4.
Danubangulo. — *Szathmári* 66/2.
Danubo, sur la maldekstra bordo. — *Szerémi* 66/4.
Debrecen. — *Várkonyi* 61/3—4. *(Tárkony)* — *Mátéffy* 66/1.
Dunaújváros. — *Baróti* 61/1. *(Ruzsits).* — *Németh* 66/2. — *Bencsik* 68/1.
Eger. — *Mátéffy* 64/2.
Esztergom. — *Újlaky* 65/1.
Fót, la Infanurbo. *Klup* 63/2. *(Kenesei)*
Hungario (ĝenerala priskribo). — *Szathmári* 66/1.

Hungario. Montoj kaj valoj. — *Lesznai* 66/3.
H-lando, la plej granda antropologia muzeo. — *Balkányi* 64/2.
Kecskemét. — *Németh* 66/2. — *Illés Sándor* 68/2. *(Újlaky)*
Kisbalaton. — *Tildy* 63/3. *(Újlaky)*
Komló. — *Városi* 61/2. *(Balkányi)*
Miskolc. — *Gergely* 66/2.
Miskolc-Tapolca. — *Mezei* 64/4.
Pécs. — *Pechan* 62/1. kaj 66/2. — *Tiszai* 68/1.
Szeged. — *Székely* 65/2., 66/2.
Szentendre. — *Szathmári* 65/3., 66/4.
Szombathely (Savaria). — *Dobos* kaj *Mátéffy* 66/4.
Tapolca (Balaton). — *Mezei* 64/4.
Tatabánya. — *Dezséry* 62/1. *(Mátéffy)*
Tiszakécske. — *Korányi F.* 62/2. *(Ruzsits)*
Zirc, arboreto — *Koós T.* 63/1. *(Újlaky)*

***

Pilgrimo al la Sankta Ŝtono — *Germanus* 62/3. *(Nagy)*
Impresoj el Bulgario — *Újlaky* 63/4.
Udmurtio — *Dettre Viola* 65/4.
Kőrösi Csoma Sándor — *Baktay* 65/1. *(Nagy)*
Magyar László — *Toldi—Varga* 68/2. *(Mátéffy)*
Turismo — *Fenyvesi* 69/4.
Vojaĝo en Italio — *Szekeres* 69/4.
En Mez-Azio — *Cseszkó* 68/1.
Vojaĝo en kvin kontinentoj — *Haszpra* 70/2.
Sud-Ameriko kaj la hungaroj — *László—Bencsik* 70/4. *(Szabó V.)*
Hungaroj en Nord-Ameriko — *Szabó Valéria* 70/3.
Centro de Eŭropo — *Szathmári* 70/1.
Najbareco, amikeco 70/3, 70/4.

Bazaj sciencaj artikoloj

Rusznyák István: Hungara Scienca Akademio 62/2. *(Kökény, Tárkony)*
Ortutay Gyula: Scienco kaj politiko 62/3. *(Tárkony)*
Ortutay Gyula: Humanisma etnografio 70/1. *(A. K.)*
Bognár József: Reformo de la h. ekonomio 69/4. *(Vigh)*
Selye: „La streĉo de la vivo". *Avar.* 70/3.
Marx György: „La plirapidiĝinta tempo". *Ponori Thewrewk.* 68/2.
Szent-Györgyi: „Miaj malfaciloj kun la atomo". 69/2. *(Somlai)*

Komunikado, komerco, filatelio, specvetura

Budapeŝta Metro — *Bácskai* 69/2.
Budapeŝta Int. Foiro — *Garamvölgyi* 67/3 — *Szekeres* 69/3.
Centra Prospektarkivo — *Zoltán* 68/2.
Fervoja trafikpolitiko — *Bácskai* 69/1.
Filatelio en la plej multaj n-roj. Serio havanta ĝeneralan intereson: La historio de Hungario sur poŝtmarkoj — *Lett Miklós de* 63/4 ĝis 68/4.
Filatelia Muzeo 67/1.
Fremdultrafiko en H. — *Lantos* 66/2. *(Tárkony)*
Interkomunikada Muzeo *Csóra* 67/2.
Novaj fervojaj vagonoj — *Kapitány* 61/3—4.
La signifo de spacveturado — *Thewrewk* 68/3.
Por kio veturi surlunen — *Thewrewk.* 70/2.
Poŝto — Centjara la h. poŝto — *Bácskai* 67/4.

La naturo

Zoologia Ĝardeno en Bp. — *Anghi* 62/2. *(Mátéffy)*
Zoologia Ĝardeno en Bp. — *Avdeev-Najdin* 63/1.
Hundospecoj en Hungario — *Puy* 68/1. *(Újlaky)*
Ĉevaljungoj Hungariaj — *Várady* 64/4. *(Újlaky)*
Fruktoproduktado Hungaria — *Tomcsányi* 65/3. *(Újlaky)*
Gas-erupcio en Szank — *Jakucs* 66/2. *(Újlaky)*
Herman Ottó — *Kökény* 65/2.
Askania Nova (Zoo en SU) — *Anghi* 65/3. *(Mátéffy)*

Instruaj, sanitaraj kaj socialaj problemoj

Ilku Pál: La hungara lerneja reformo. — 64/3. *(Újlaky)*
Molnár János: H. studentoj eksterlande... 70/1. *(Farkas Éva)*
Szerdahelyi: Metodo — metodoj. 69/1, 69/2 69,3.
Balkányi: Vizito en gimnazio. 61/3—4.
Újlaky: La E-instruado en Hungario 68/2.
Kökény Sándor: La progreso de la tajpado
Patrin- k infanprotektado — *Mezei* 61/3—4.
Semmelweis — *Újlaky* 62/4.
Biblioteko de infanoj. — *Lukács Ágnes* 62/2.
Kuracpedagogia instituto — *Szabó Pál.* 62/2.
Hungaraj blinduloj — *Lukács Géza* 61/3—4. *(Kökény)*
Unua med. helpo (savistoj) — *Mezei* 62/4.
Novaj medikamentoj — *Fenyvesi* 69/2.
El la laborejo de la scienco — *Mezei* 63/3.
Kuracado per akvo — *Vigh* 70/2.
La organizita ripozado — *Nádasi* 68/1.
Familiaj festoj, kutimoj — *Gilicz)* 64/1. *(Mátéffy)*
Junularo hodiaŭa — *Gilicz* 63/2. *(Szerémi)*
Loĝejkonstruado en Budapeŝto — *Cseszkó* 67/4.
Hungara gastronomio — *Szathmári* 66/2.
La h. gastigado — *Eged Ida* 61/3—4.
H-landaj zorgoj — *Vigh* 69/4, 70/1, 70/2.

Sporto

Ĝenerale pri la h. sporto. *Szerémi* 61/1.
La h. sporto. *László* István 64/1. *(Mátéffy)*
Sporto. *László* 70/3.
La sporto kaj Esperanto. *Pusztai* 68/3.
Újlaky-Nagy Tibor. Diversaj temoj. 70/3, 70/4.
Ĉevaljungaĵoj en Hungario. *Várady* Jenő 64/4. *(Újlaky)*
Letero de olimpikonoj. Organizis: *Szenes Imre* 66/1.
Gaudeamus igitur. *László.* 66/1. *(Tárkony)*

Tekniko, matematiko, uzinoj

Kempelen, la ĉiofarulo — *Pap János* 61/1. *(Bodó)*
Bolyai János — *Újlaky* 61/1.
Niaj matematikistoj — *Tóth János* 70/1.
Viva kalkulmaŝino — *Bajor Nagy* 61/2. *(Balkányi)*
Puskás Tivadar — *Újlaky* 63/2.
Transformatoro — 75-jara — *Újlaky* 61/3—4.
Goldberger Teksfabriko — direktorino *Nagy (Somlai)*
Orion Fabriko — *Berceli* — *Balkányi* — *Kökény* 61/3—4.
Ikarus Fabriko — *Cseszkó* 64/3.
Virinoj en la malpeza industrio — ministrino *Nagy* 61/3—4. *(Somlai)*
La mondfama MOM — *J. D.* 69/1. *(Kökény)*
Realiĝintaj revoj sur la tornilo. *G. F.* 70/2.
Hidropneŭmatika dragmaŝino — *Csongrádi* 67/3. *(Egry)*
Esplorinstituto de Akvomastrumado — *Haszpra* 62/3.
101 teknikaj novaĵoj — *Kökény* 69/4.
El la inventaĵoj de 25 jaroj — 70/3.
La stenometrio — *Molnár* 65/2. *(Újlaky)*

Esperanto-movado kaj historio

E. en Hungario ĝis 1912 — *Balkányi* 62/3.
E. en Hungario 1917—19 — *Balkányi* 63/2, 63/3.
E. en Hungario 1945—49 — *Kökény* 70/2.
La sindikatoj — patronoj de la E-movado — *Szentes* 65/4. *(Tárkony)*
Estinto kaj estonto de la h. E-movado — *Nemes Frigyes* 61/2.
Renkontiĝo de esp-istoj-veteranoj — *Szerémi* 61/2.
Kádár János salutas la revuon Hungara Vivo 61/3—4.
Virina E-renkontiĝo en Bp. — *Szerémi.* 61/3—4.
Kongreso sen interpretisto — *Kossa* 62/1.
La rolo de L. I. en la scienca vivo — *Mezei* 62/1.
Jubilea E-kongreso — *Pechan* 62/4.
Du sukcesaj jaroj de HEA — *Kökény.* 63/2.
Radio Budapeŝt kaj E. — *Pusztai* 67/2, 67/3, 68/1.
El nia historio (Csév) — *Szerémi* 67/2.
E-movado en 1965 — *Szerémi* 65/2.
Granda kolektado de subskriboj — *Újlaky* 67/3.
E-instruado en Hungario. 68/3. *Újlaky*

48a UK en Sofio — *Szerémi; Újlaky* 64/4.
50a UK en Tokio — *Szerémi* 65/4.
Eŭropa E-Konferenco en Vieno — *Benczik* 65/4.
51a Universala Kongreso en Budapeŝto 1966: Du kongresoj — du epokoj — *Baghy* 66/1. — La 51a! *Szerémi* 65/3. — Kongresa saluto 66/2. — Saluto al la kongreso de *Ödön Kisházi* 66/4. — Festparolado de *Lapenna* 66/3. — Poezia raporto pri nia 51a de *Újlaky-Nagy* 66/4. — MEM-konferenco, Virina Konferenco — *Szerémi* 66/4. — Kongresaj eĥoj — *Balkányi* 67/1.
53a UK en Madrid — *Farkas Éva* 68/4.
54a UK en Helsinki — *Mátéffy* 69/4.
55a UK en Vieno — *Bácskai* 70/2; *Rados* 70/4.

Gyula. Somera E-Universitato — *Szerémi:* 62/4, 63/4, 64/4, 65/4; *Mátéffy:* 67/4, 68/4.
Szeged. Pedagoga Seminario. — *Pechan* 66/1. — *Nyitray* 67/4. — *Kertész Marianne* 68/4.
Szeged. E-Muzeo kaj Biblioteko — *Szabó Mária* 69/3.
Balaton. E-Seminarioj — *Kökény:* 63/4; *Balkányi:* 65/1; *Nádasdi:* 66/1; *Faragó Mária:* 70/2.
Szolnok. Int. reknontiĝo — *Gaal M.* 66/1.
Pécs. TEJO-Kongreso — *Benczik* 65/4., 67/1; *Szerémi* 66/4.
Infana Kongreseto. En Sofia — *Lukács Ágnes* 64/4. — En Budapeŝt — *Lukács* 66/4., *Szerémi* 66/4, *Vári* 67/3. — Intervjuo kun kvarjara knabino — — *Nádasdi* 67/1.
Fervojistaj kongresoj. En Budapeŝt — *Csóra* 62/2, *Kapitány* 62/3. *Bácskai* 62/4. En Hamar (Norvegio) — *Bácskai* 65/4.

Saluto al niaj legantoj — *Gergely* 69/1.
Kreskanta nombro — *Farkas Éva* 69/1.
Renoviĝi — *Gergely* 69/2; *Vigh* 69/3.
E. en la hungara gazetaro — *Csiszár Ada* 69/3.
E. — studobjekto en la Budapeŝta Universitato — *Vaskó* 69/3.
E. kaj mia vivemo — *Nádasdi* 69/3.
Nobel-premia Esperanto — *Németh Anna* 69/4.
Por junigo de E-ujo — *Gyarmathy* 69/4.
Vivi kiel esperantisto — *Balkányi* 69/4.
Franz Jonas en Budapeŝto — *Mátéffy* 70/3.
Intervjuo kun Lapenna — *Vigh* 70/3.
Irlandano en la H. Instituto de Kulturaj Interrilatoj. 69/4. *László E.*

Esperantistoj

kun biografiaj kaj movadaj indikoj. La verkistojn, poetojn vidu ĉe la koncerna parto.

Bárczi Géza 69/2. *Ruffy, Balkányi.* — Bleier Vilmos 68/4. *Kalocsay.* — Farkas Ernő 68/2, 69/3. — Gergely Mihály 66/2. — Győry Nagy Lajos 66/3. — Hámán Kató 61/3—4. *Szerémi.* — Jobbágy Károly 66/3. — Joó István 65/1. — Jurák-Khek-familio 67/4. *Kökény.* — Kenesei Mária 61/1. — Koós Antal 66/4. — Kossa István 65/3. *Balkányi.* — Kökény Lajos 70/1. *Kalocsay.* — Langlet Valdemar 63/4. *Kökény.* — Mezei Károly 65/1. — Molnár Gyula 65/1. — Nádasdi Márta 68/4., 69/3. — Pál István 67/2. — Sárosi Mihály 64/2. *Újlaky.* — Szalay 68/4. — Szatmári Szatyi Sándor 63/1. *(Szerémi)* — Tiborc Zsigmond 67/3. *(Timmer)* — Tolnai Göndör-familio 61/3—4. *(Kökény)* — Újlaky-Nagy Tibor 66/4. — Ungár Imre 62/3, 68/1. — Vári Márta 66/4, 68/4.

AKVO-ESPLORO
AKVO-ELTERIGO
AKVO-REZERVADO
AKVO-PURIGADO

PRI AKVO-PROBLEMOJ STARAS JE VIA DISPONO

NIKEX, HUNGARA EKSTERLANDKOMERCA ENTREPRENO POR PRODUKTAJOJ DE PEZA INDUSTRIO
BUDAPEST, V., JÓZSEF NÁDOR TÉR 5–6., BUDAPEST 5. PF. 128.
TELEGRAMOJ: NIKEXPORT BUDAPEST.

NIKEX, HUNGARIAN TRADING COMPANY FOR PRODUCTS OF HEAVY INDUSTRY
BUDAPEST V., JÓZSEF NÁDOR TÉR 5–6. P.O.B. 128. BUDAPEST 5.
CABLES: NIKEXPORT

NIKEX UNGARISCHES AUSSENHANDELSUNTERNEHMEN FÜR DIE ERZEUGNISSE DER SCHWERINDUSTRIE
BUDAPEST V. JÓZSEF NÁDOR TÉR 5–6. BUDAPEST 5. POSTFACH 128.
TELEGRAMME: NIKEXPORT

NIKEX SOCIÉTÉ HONGROISE POUR LE COMMERCE DES PRODUITS DE L'INDUSTRIE LOURDE
BUDAPEST V., JÓZSEF NÁDOR TÉR 5–6. BUDAPEST 5. B. P. 128.
TÉLÉGRAMMES: NIKEXPORT BUDAPEST



ZOLTÁN BALÁSSY

Li estas entute dudek-ok-jara: aĝo juna, precipe ĉe belartista kariero. Tamen en pluraj specoj de belarto li jam pruvis sian bonegan preparitecon kaj fortikan, originalan talenton. Kun preskaŭ tia sama certeco li kreas ceramikaĵojn kiel grafikaĵojn, etplastikaĵojn kiel foto-muntaĵojn. Liaj grafikaj ilustraĵoj por la verkoj de Villon kaj Krudy aŭ liaj ceramikaĵoj lin montras juna artisto pretendema kaj eksperimentema. Unu el liaj ĉefaj fortoj estas lia desegno-scio: ankaŭ siajn ceramikaĵojn kaj etplastikaĵojn dank' al tio li povas krei kun tia bravuro kaj sprito. Li bone konas la rolon de la ideo-sprito kaj originaleco en la arto; jen unu el la kaŭzoj de tio, ke inter liaj kreaĵoj, jam ĝis nun multnombraj kaj produktitaj en diversaj belarto-specoj, apenaŭ oni povas trovi kelkajn malmultajn, kiuj ne estus pli ol la rutina laboraĵo de certmana belartisto. Subtilan inklinon li havas por la konceptado de plurvoĉa esprim-enhavo; tial liaj etmezuraj ceramikaj platoj tiel same kaptas nian intereson kiel liaj desegnaĵoj, mono- kaj lino-tipiaĵoj kaj akvafortoj.

Liaj kreaĵojn la artaj kaj literaturaj revuoj publikigadas jam de jaroj kaj oni povas ilin aĉeti en urbaj belartaĵvendejoj, kie la homoj aranĝantaj sian hejmon kun polurita gusto serĉas kreaĵojn de arto nuntempa.

— *gm* —

KÁROLY BARI

MIGRAJ CIGANOJ

Tagiĝoj ture falegas niaŝultren, nebul-oscedaj
grizaj tagiĝoj venantaj kroĉinte sin en kolharojn
de ventoj pinĉemaj; la fumo amara de malriĉo
nin sufokadas, sur niaj knaraj veturiloj
ni portas niajn ĉifone-vestitajn, violonvoĉe
karesatajn
diojn: niajn virinojn de sino el nura fajro,
kiuj naskas sur rando de fosoj, feinoj ili estas;
feinoj de vojoj, sin lavantaj per roso,
sin viŝantaj per konvalfolio, kantantaj dormon
sur siajn okulojn vespere, ilia jupsusurado
estas tempesto bolvarma; kiam la nigraj flugilfrapoj
de kornikoj skrapas tenebron super la vojoj,
embuskas ombroj inter la arboj; volas
ŝteli la tukon de niaj knabinoj, tial ke
ĝin por kiso ili redonu; hundoj sovaĝaj
ne gardas niajn tolŝirmatajn ĉarojn, nur scivolemaj
strigoj ululas sur veturil-timonoj,
sep-sigelaj neskribitaj leĝoj de olduloj malnovaj
bruligis nian koron dura, ciganoj ni estas,
sur ĉaroj tolŝirmataj nia popolo vagadas en la
mondo
inter fride kriĉantaj ventoj, ŝvite tramalsekaj
someroj; sub flamoj de cindre disrubiĝintaj
tendumfajroj serĉas trezoron ciganinoj
plu sian aĝon, ne sciantaj kiuj harojn de katoj
kadavraj metas en manplaton de l'koleratoj por
missorĉo;
vojpolvo gluiĝas niavizaĝe, senlimaj, stelo-sonĝaj
stepoj post ni frostotremetas, niaj infanoj sordidaj
taglonge sonorigas la ruĝan ĝojo-citron; senzorgaj,
niaj knarantaj ĉaroj alkreskis la ŝtonpavimon
de l'vojoj,
heno de niaj ĉevaloj spirmankaj flagras en vento,
pezaj
lumflagoj sterniĝas sur la vilaĝojn: iliaj kampuloj
levis el korfrapado de oraj tritik-kampoj muron
ĉirkaŭ siaj domoj, ni vagas sur tolŝirmataj ĉaroj
inter rustiĝintaj, rad-akse knarantaj ĉielregionoj;
fulmohakitaj cindraj arbostumpoj kaŭras
apud la vojo; iliajn fulgajn brancojn vespere
surnaĝas la luno.

Trad.: *K. Kalocsay*

Károly Bari venis en la hungaran poezion el ega profundo de sovaĝa cigana sorto, el ties ruĝa ebrio kaj glacia mizero. Li kunportis konsternan abundon de poeziaj bildoj, kaj kiel heredulo de la cigana paseo li paŝas en nian modernan mondon por kanti pri la timiga-altira cigana vivo, pri „sopiroj sekretaj kaj malkaŝitaj antaŭ la mondo", pri si mem, 17-jara junulo, nun gimnaziano en Miskolc. Lia unua poemlibro estas „Super vizaĝon de mortintoj".

Z. Balássy

Ŝnuriranto

Esperanto-Semajnoj en Hungario

— Julio 1972 —

Kore ni invitas vin, pasigu tagojn aŭ semajnojn en tri diversaj partoj de nia lando.

HUNGARA KULTUR-FESTIVALO

— sub aŭspicio de UEA —

Budapest, 17—23 julio 1972.

En mezo de julio ni prezentos al la internacia esperantista publiko la klasikajn kaj modernajn verkojn de l'hungara literaturo kaj arto.

Krom la arta programo ni organizos viziton de la urbo, ekspoziciojn, ekskursojn. Ni zorgos pri ejoj por fakkunsidoj laŭdezire.

Provizora Programo de la Kultur-Festivalo

1. Solenaj aranĝoj:
   - — Inaŭguro
   - — Ferma kunsido
2. Kulturaj programoj:
   - — Prezento de l'hungara literaturo — poezio kaj prozo
   - — La hungara muziko
   - — Kanto kaj ĥoroj
   - — Folklor-prezentado
   - — Filmprezentadoj
3. Servoj:
   - — Loĝiga Servo
   - — Ekskursa Servo
   - — Vizito de muzeoj, art-ekspozicioj
   - — Diversaj fakkunsidoj

Loko: Ĉefurba Kultur-Domo, Budapest, XI.

Dato: 17—23 julio 1972. lundo — dimanĉo.

Aliĝkotizo: 240. —forintoj aŭ 8.— USA-dolaroj.

Detalan informon petu de la organizanto:

Hungara Esperanto-Asocio, Budapest 5. Poŝtfako 193.

10-a Jubilea Sesio de SOMERA ESPERANTO-UNIVERSITATO

Gyula, 10—16 julio 1972.

En la jaro 1972 — inter la 10—16 julio — ni aranĝos la 10-an Jubilean Sesion de Somera Esperanto-Universitato.

Detalajn informojn petu de Somera Esperanto-Universitato. Gyula, 48-as u. 11.

5-A INTERNACIA RECONTIĜO DE ESPERANTISTOJ-NATURAMIKOJ (IREN)

Abaliget, 24 julio-2 aŭg. 1972.

Ĉiujare kreskas la nombro de la partoprenantoj de IREN. Kiu foje vizitis nin, neniam forgesas la agrablajn tagojn, pasigitajn en belega naturo, vera internacia atmosfero.

Partoprenu ĝin, petu detalajn informojn de la organizato:

HEA 3-A TERITORIA KOMITATO, PÉCS 1. Poŝfako 2.

HUMURO

Ĵurnalisto alparolas drinkemulon.

— Diru do, kio vin devigas tiel multe drinki?

— Neniu, kara sinjoro. Mi estas propravola alkoholisto.

Junulo al sia amiko dum drinko:

— Mia kompatinda patro nun devos vivteni ankaŭ duan virinon.

— Kiel do? Ĉu li havas eble amatinon?

— Ne, sed ankaŭ mi edziĝis.

Du kompanoj meditadas super sia glaso da vino.

— Se mi trinkas iom tro, tuj aperas bluaj makuloj sur mia korpo.

— Tion mi konas. Ankaŭ mia edzino estas tiel energia.

Virineto sidas en aŭtobuso. Ŝia mini-jupo suprenglitadas kaj ŝi ĉiam ree tiras ĝin malsupren. Nun ekparolas la viro sidanta vid-alvide.

— Ne klopodadu, fraŭlinjo. Mia pasio estas la alkoholo.

Virino plendas al sia amikino.

— Mia edzo tutvespere sidas antaŭ la televidilo, rigardas la krimiojn, la matĉojn, eĉ unu vorton li ne parolas kun mi. Mi jam pensis, ke mi lin forlasos. Sed por kio? Li tion eĉ ne rimarkus.

Geedzoj disputas. Fine la edzino volas esti kompromisema:

— Nu, bone, mi rekonas, ke ni ambaŭ estas kulpaj, precipe vi.

La hangaraj pioniroj de la tekniko

Ányos Jedlik kaj la dinamo

Eble malmultaj scias, ke la dinamo, la plej disvastiĝinta elektra maŝino de nia teknika mondo, estas hungara inventaĵo: ĝi ligiĝas al la nomo de Ányos JEDLIK (1800—1895).

La juna Jedlik komencis en sia 22-a jaro sian karieron kun pedagoga diplomo en la mano, kiel mezlerneja instruisto. Poste, ekde 1840, li instruis kiel profesoro de fiziko en la Budapeŝta universitato. Lia interesiĝo estis altirata precipe de la elektromagneta efiko de la kurento. En 1828 li kreis la unuan elektromotoron, funkciantan baze de elektromagneta efiko.

Sian plej grandan inventaĵon, la dinamon, li eltrovis dum siaj eksperimentoj pri la t.n. „unupolusa elektra ekmoviganto", antaŭante tiamaniere per 6 jaroj la konatajn *Siemens* kaj *Wheatstone*, kiuj faris sian eltrovon en 1867, sendepende de Jedlik.

La dinamo konstruita de Jedlik havas pioniran signifon ankaŭ kiel unupolusa maŝino, ĉar la problemon de la unupolusa generatoro, aplikeblan en la praktiko, oni solvis nur en 1905.

Ányos Jedlik, havanta ankaŭ aliajn inventaĵojn, agadis ankaŭ per ampleksa kaj konsiderinda teknika verkado. Li partoprenis la redaktadon de la unua germana-hungara scienca fakvortaro. Konsiderinda parto de nia fizika, kemia kaj matematika vorto-trezoro devenas de li. Li meritas, ke lia nomo estu eternigita inter la granduloj hungaraj de la teknikaj sciencoj.

István László

MEDICOR

produktas kaj eksportas:

instalaĵojn por rentgena diagnozo kaj radio-terapio, medicinajn elektrajn kaj elektronajn aparatojn por diagnozado kaj por kuracado, narkotajn aparatojn. instalaĵojn por operaciejoj kaj por malsanul-ĉambroj, sanitarajn veturilojn, medicinajn kaj veterinarajn instrumentojn, sanitarajn amasi-artiklojn, unufoje uzeblajn sterilajn ilojn. Kompieltaj sanitaraj unuoj estas projektataj kaj liverataj. Informado kaj konsilado en hospital-projektaj-organizaj aferoj.

Uzinoj Medicor Budapest



MEDICOR

MEDICOR BUDAPEST

LADISLAO SOMLAI
(1902-1971)

Ne multaj faris tiel multe por la diskonigo de la hungara literatura prozo en E-o, kiel nia tradukartisto *Ladislao (László) Somlai,* kies forpason nun ni dolore funebras. Ok romanoj, unu popularscienca verko kaj pli ol cent noveloj, inter ili multaj perloj de la hungara literaturo markas lian tradukistan vojon, kaj faras ne-velkonta lian memoron.

Lia antaŭa nomo estis *Spierer,* kaj plej multaj el liaj verkoj aperis sub la nomo *L. Spierer* aŭ sub pseŭdonimo *L. Rereips.*

Mejloŝtonoj de lia vivovojo: li naskiĝis la 7. de marto 1902 en *Vajszló* (depart. *Baranya,* Sudhungario), provadis diversajn profesiojn, fariĝis pentraĵ-komercisto; post lia esperantistiĝo en 1924, jam en 1928 komencis aperi liaj novel-tradukoj; en 1937 li tradukis, kune kun L. Halka, la romanon de Jolanta *Földes;* „La strato de la fišanta kato"; poste venis la mondmilito, la persekutadoj faŝismaj; ekde 1945 li estis oficiro de la hungara armeo ĝis sia emeritiĝo; li daŭrigis sian diligentan laboron por E-o kaj konigo la hungaraj literaturaj valoroj, ĝis lin atakis longa suferiga malsano, de kiu li mortis en hospitalo la 12-an de marto 1971.

Lia poresperanta laboro komenciĝis en la hungara laborista movado, en HESL, sed paralele kun sia movada laborado li konstante perfektigis sin en la lingvo kaj baldaŭ kapabligis sin por bona tradukado de literatura prozo. De la nuntempa eminenta romanverkisto *József Darvas* li tradukis la romanon „De Epifanio ĝis Silvestro" kaj aperigis ĝin daŭrige en la monata revuo „Nia gazeto" (Nice, 1937.). Inter la „Epoko-Libroj" (Britlando) aperis libroforme en 1938 „La knaboj de la Paŭlo-strato", junulara romano de la fama hungara roman- kaj dram-verkisto *F. Molnár* (pasintjare ĝi estis filmigita en anglahungara kooperado). En 1940 aperis „La vojoj estas nekonataj", romano de la ekspresionisma-konstruktivisma aŭtoro *L. Kassák.* Eble lia plej populara romantraduko estis tiu de la humura „Sep vangofrapoj" de *K. Aszlányi* (1943). Post la milito sekvis „Printempo de morto" de *L. Zilahy,* romano grandsukcesa ankaŭ en sia filmigita formo. Krom la traduko de „Amara pano", romano de *J. Darvas* 1957). Somlai partoprenis ankaŭ en la kolektiva traduko de „Dudek horoj", romano de *F. Sánta* (tiel same filmigita). En „Sennacieca Revuo" (1933—1935) aperis en daŭrigoj lia traduko de la seks-eduka popularscienca verko de *B. Tótisz.*

Krom tiuj libroj, la noveltradukoj de Somlai aperis dum jardekoj en diversaj, ĉefe eksterlandaj E-revuoj: American Esperantist, Amerika Esperantisto, L'Esperanto, Torino, — Rivista Italiana di Esperanto, — Flandra Esperantisto, — Heroldo de Esperanto, — Esperanta Praktiko, Berlin, — La Nova Epoko, aldono al Sennaciulo, ktp. — Krome kompreneble en hungaraj E-gazetoj: Literatura Mondo, Hungara Vivo, Hungara Esperantisto.

Liaj plej ŝatataj aŭtoroj estis Jenő Heltai, Viktor Rákosi, Dezső Kosztolányi, Béla Bacsó, Zsigmond Móricz, Ferenc Herczeg, Kornél Tábori, Károly Lovik, kaj multaj aliaj, ĉefe socialistaj aŭtoroj.

Trafoliumante lian verkaron, oni povas tuj konstati, ke la interesiĝo de Somlai turniĝis ĉefe al sociaj temoj, plutokrataj maljustaĵoj, al doloraj suferoj de ethomoj, al ideologiaj kontrastoj. Alia flanko de lia interesiĝo estis la humuro, prezentiĝanta en groteskaj kontrastoj kaj sprita rakontmaniero.

Kiel tradukisto, li klopodis je plejeble granda fideleco kaj facila kompreneblec o. Tial li laŭeble sekvis la Zamenhofan lingvouzon, neologismojn uzis nur malmultajn, — laŭ li, en prozo tiuj ne estas tiom bezonataj kiel en poezio. En romano aŭ rakonto estas grave, ke ne sole la plej perfektaj lingvaj spertuloj provu legi flue la fluan rakonton, sed enkaŭ la esperantistoj de meza lingvo-scio. Ĉe morna aŭ ŝerca situacio ne estu haltigata la ploro aŭ la rido pro necesiĝo serĉadi en vortaro, precipe, se eĉ en la vortaro ne estas trovebla la enigma vorto. (Noto por la supre nomitaj esp-istoj: *morna* signifas „preme malhela", „malserena".)

Somlai estis diligenta memperfektiganto. La modestan scion, kiun li povis akiri en la E-Societo Laborista, li kompletigis per legado de la E-aj klasikuloj kaj per konsultado kun niaj lingvaj granduloj, — de kiuj li ĉiam volonte akceptis konsilojn. En liaj tradukoj — vicigitaj kronologie — estas bone rimarkeble, kiel ĉe ĉiu posta traduko riĉiĝas lia vortostoko, beliĝas la stilo, variiĝas la esprimkapablo.

Ĝuste tiu klopodo je ĝuo de la belo, je akiro de beletristikaj modeloj estis unu el la kaŭzoj de lia senlaca biblio'ila agado. Li senĉese kolektis valoraĵojn de la originala kaj tradukita E-literaturo, aĉetis, internacie interŝanĝis malnovaĵojn, novaĵojn, raraĵojn — dum jardekoj. Tiel lia librokolekto (1200 volumoj) fariĝis, laŭ nia scio la plej granda E-a biblioteko en Hungario. Pri ĝia konservo kaj gardo li zorgis testamente, heredigante ĝin al sia kunlaborantino Anna Székely. El liaj postlasitaj tradukoj ni prezentos poste en nia revuo.

Per lia forpaso la hungara movado kaj ankaŭ la tuta Esperantujo devis dolore perdi interesan, karakterizan figuron, veran specialiston de la Esperanta libro. Bedaŭrinde, siajn grandajn konojn ĉikoncernajn li forportis kun si, do neniam plu ni povas nin turni al li por informo kaj helpo.

Alfonso Pechán

VIZITO ĈE LA 3-A TERITORIA KOMITATO DE HEA

En la ĉefplaca konstruaĵo de la departementa konsilantaro eleganta tabulo signas la ejon de la 3-a Teritoria Komitato en Pécs. *Ĉiu-tage posttagmeza deĵoro ebligas* al la departementaj esperantistoj priparoli ĉi tie poresperantajn problemojn, informiĝi pri la taskoj, komunaj aranĝoj, ekskursoj ktp. Trairinte la klubĉambron, ni atingas la oficejon de la Teritoria Komitato. Nian rigardon kaptas la Zamenhof-busto, kies originalon oni inaŭguris en la Esperanto-Parko dum la 22-a IJK, flagoj, memoraĵoj donacitaj de diverslandaj partoprenintoj de la ticaj renkontoj. En la vitrošranko inter diversaj libroj vidiĝas ekzempleroj de du lokaj eldonaĵoj: Grupa Vivo kaj Pioniro. Diligente tajpas la administranto cirkuleron por 13 grupoj de la teritorio enhavanta tri departementojn: Baranya, Somogy kaj Tolna. Sed la alvenintojn ĉiam tre afable li salutas kaj akceptas.

Ni interesiĝas pri la laboro de TEK. Post sekundoj antaŭ ni troviĝas la jara laborplano. Okulfrape multe de aranĝoj viciĝas en la programo.

— Kial vi aranĝas 4 internaciajn kaj 8 teritoriajn renkontojn? — ni demandas. La respondo estas logika. — Pri la grupaj kunvenoj ni ne povas raportigi en la ĵurnaloj, sed la internaciaj aranĝoj, kunvenoj kun filatelistoj, eksterlandaj studentoj en la kadro de la Semajno de Internacia Amikeco, Esperanto-balo jam alvokas la atenton de la publiko.

La informadon interrompas la alveno de la sekretariino, s-ino Elizabeta Pallós. Ŝi sciigas nin pri la nombro kaj laboro de la aranĝantaj aktivuloj.

— Fakte, preskaŭ ĉiu aranĝo havas alian respondeculon, inter ili novajn aktivulojn, gejunulojn, kiuj volas pruvi sian organizkapablon. Nia komitato tiel edukas konsekvence posteulojn por la movado.

— Kiam fondiĝis via komitato kaj kiam vi komencis varbi partoprenantojn por la internaciaj renkontoj?

— En la jaro de la 22-a Internacia Junulara Kongreso ni antaŭvidis la bezonon fondi komitaton por unuece disvastigi Eperanton en la teritorio. En 1967 la unuan fojon ni disdonis invitilojn por la Internacia Renkontiĝo de Esperantistaj Naturamikoj en Abaliget kaj por Tendumado de Esperantistaj Pioniroj. En la jaro 1971 la kvaran fojon ni prepariĝas akcepti gastojn por ambaŭ niaj renkontoj. Evidentiĝis, ke la bela situo, la mediteranea klimato de Pécs, ĉarmaj regionoj de Mecsek kune kun la gastama esperantistaro allogas tiujn, kiuj volonte pasigas sian ferion en esperantista medio. Ankaŭ la infanoj ĉiujare malvolonte adiaŭas la tendaron, kie per la internacia lingvo efektiviĝas varmaj interamikiĝoj. Pluraj infanoj partoprenis ĉiujn 3 tendumadojn, kaj nur pro la aĝlimo ili ne povas daŭrigi la serion de belegaj ferioj en internacia tendaro. En 1971 per du novaj internaciaj renkontoj plivastiĝas la programo de la esperantistoj en Baranya: en junio, per najbareca renkontiĝo kun la jugoslavaj gesamideanoj en Mohács, kaj jarfina (Silvestra) renkonto en Pécs.

Intertempe la administranto forlasis nin, alvenis ja kasistoj de la grupoj por aĉeti membromarkojn, esperantaĵojn, transdoni la enkasigitajn membrokotizojn. Ĉio estas precize administrata. La regionaj grupoj perpoŝte sendas la enspezojn kaj ricevas la petitajn esperantaĵojn, HE-ojn.

— Kia estas la kontakto kun la teritoriaj grupoj? — ni informiĝas de la sekretariino. Ŝi emfazas la gravecon de la konstanta, sistema persona interrilato. Ĉiu grupo havas protektantan kunliganton en TEK.

Klientoj alvenas, foriras. Ankaŭ neesperantistoj vizitas la teritorian komitaton por interesiĝi pri lingvokursoj. Ĝuste italan samideanon alkondukas junulo por prezenti sian gaston, kiun interesas la loka movado.

Tamen nia mallonga vizittempo ne permesas laŭplaĉe observi la vizitantojn, ĉar kelkajn vortojn ni volus aŭskulti pri la kontakto de TEK kun la lokaj instancoj.

— La informado estas kontentiga, ĉar *la 3-a TEK kreis bonajn kontaktojn kun la urbaj, departementaj, ŝtatadministradaj instancoj, sociaj, kulturaj, fremdultrafikaj oficejoj ktp, kiuj rekonas la aktivadon de la loka Esperanto-movado kaj je la peto de TEK laŭeble helpas en konkretaj aferoj.* TEK postulas disciplinon de la esperantistaro koncerne la vizitojn ĉe la supremenciitaj instancoj por akiri kaj konservi la reputacion de la Esperanto-movado.

KOMPONI AŬ VIVI

Ludvig van Beethoven, la komponist-titano volis foje tagmanĝi. Li sidiĝis ĉe la tablo kaj frapis, por ke la kelnero venu. Sed, kiel kutime, kelnero ne aperis.

Intertempe Beethoven prenis sian notkajeron kaj faris siajn notojn. Finfine venis la kelnero kaj demandis la komponiston, kion li deziras. Sed Beethoven estis jam muta kaj blinda — li komponis intense. La kelnero sciis, kiu estas la stranga gasto kaj lasis lin labori.

Subite ekkriis la komponisto: — „Pagi!" — kaj ege miris, kiam la kelnero klarigis al li:

— „Ne pagu, vi ja nenion mendis!" *L. L.*

Lajos Tárkony

REVUO DE REVUOJ

Pri INTERLINGVISTIKA INFORMA SERVO (red.: A. kaj W. Bormann) mi skribis foje, ke oni devas ĝin legi, tutan; nun tamen mi raportos pri la artikolo „Muro de silento". Temas pri la kvin specoj de rezisto kontraŭ E-o fare de instancoj naciaj kaj internaciaj. — 1. *Oni silentas,* t.e. zorge detenas sin eĉ eldiri la vorton E-o, tiel ke tio jam estas konscia bojkotado. — 2. *Oni rifuzas,* eĉ ruze: la peticio de UEA kun milionoj da subskriboj kaj la propono de Svedio dronis en la arkivoj de la UNO-sekretariato, tiel ke la budĝeta komisiono ne povis por ĝi disponigi financajn rimedojn; la kulpuloj, IU kaj AJN, estas nekapteblaj. — 3. *Oni ignoras* E-on en la futurologio, kiu neniam okupiĝas pri la lingva interkompreniĝo sur la ŝrumpinta planedo (tio, cetere, ne mirigas min, ĉar la fantazio de la futurologoj kutime ne pasas trans la teknikan evoluegon kaj naskas nenian ideon pri la privata, familia, societa vivo de la estontoj). — 4. *Oni ne kompetentas;* ĉi tie temas — strange sed prave — pri lingvoscienculoj (plenan respekton al la esceptoj!). Jes, ĉar, miaopinie, ili domaĝas la penon funde studi E-on kaj ĝian literaturon, sed tamen volas fari ian juĝon, do ili tiras sin el la embaraso per timema „jes" kaj ia „tamen". Tia „tamen" estas, ke E-o *ne havas stilon,* kvankam Kabe estis siatempe „la unua stilisto esp-ista", do superis ĉiujn aliajn per sia *stilo;* kvankam ekzemple Shakespeare estas *re*tradukata en E-on en *stilo* pli adekvata, pli esprimiva, pli elvokiva. Alia „tamen" estas, ke E-o kiel ĉies dua lingvo nepre disdialektiĝus. Mi iomete hontas atentigi la respektivan scienculon, ke la franca lingvo ne disdialektiĝis, dum ĝi estis diplomatia lingvo kaj plurlande dua lingvo de la intelektularo; la novaltgermana lingvo restis sekura lingva ponto inter germanoj, kiuj ne povus interkompreniĝi, se ĉiu parolus siadialekte (iom da prononcdiferencoj ne malhelpas la komprenon). — 5. *Oni ne iniciatemas,* t.e. nek la grandaj nek la etaj lingvoj volas sin ŝirmi per neŭtrala interkomprenilo (jen fakto, kies komplikajn psikajn kaŭzojn mi malpli komprenas, ol ke mi povus ilin klarigi). — *Kontraŭefikas la rezistadon* tamen fortoj kreskantaj: lingvoscienculoj (pli kuraĝaj) ellaboras teorian bazon por E-o, sociologoj kaj privataj institucioj klopodas science fundamenti la solvon de la interlingva problemo. — La *ĉefaj taskoj* por espistoj estas abunde liveri science bazitajn informojn, refuti la pseŭdosciencajn kontraŭargumentojn, penetri en la lernejojn, decidigi malgrandajn ŝtatojn por interveno ĉe grandaj organizoj internaciaj, varbi multajn anojn kaj simpatiantojn por la E-organizoj.

En ESPERANTO de UEA (1971, 2.) *Ragnarsson* citas la lingviston *Borgström,* laŭ kiu vere funkcianta internacia lingvo reduktus la uzon de la naciaj lingvoj, kaj la publiko tion antaŭsentas; tial ĝi rezistas instinkte al E-o, ne volante perdi sian gepatran lingvon emocie ŝarĝitan; sekve, laŭ *Ragnarsson,* „la ĉefa obstaklo al E-o estas psika". La surpriza konkludo de R. estas, ke tiu „emocia ŝarĝo" estas io naciisma, kaj ke la propagando de E-o estu parigita kun eduko kontraŭ la naciisma lingvoemociismo. Nu, tio vere estus „ursa servo". Prefere oni diru trankvilige: Kiam E-o estos ĉies dua lingvo, la samlingvanoj gaje plu krokodilos inter si.

DER ESPERANTIST (GDR) raportas pri centra renkontiĝo de la GDR-aj esp-istoj en Karl-Marx-Stadt; la riĉenhavaj laborkunsidoj certe donis novan stimulon al la disvastigo de E-o en GDR. — *D. Blanke* faras interesajn rimarkigojn pri la terminoj de historia materialismo en PIV. — La rubriko de germanaj parolturnoj en E-o demonstras la tempomaturecon de nia samcela entrepreno „Domfabriko". — Bedaŭre adiaŭante al „Nuntempa Bulgario", la gazeto dediĉas varme aprecajn vortojn al nia „Hungara Vivo", kore dankindajn, al ni tre karajn.

MEDICINISTAJ NOVAĴOJ, neregula cirkulero (red. Dro J. Hradil, Cesky Dub 137. III), fervoras por akceptigi E-on kiel internacian medicinan lingvon. Ĝi raportas inter aliaj pri la interesa eksperimento de Dro Lajos Molnár (Budapest XI. Kelenhegyi út 81.), kiu ensendis titoltradukojn de medicinaj artikoloj kaj petas la abonantojn de la cirkulero, ke ili petu de la aŭtoroj represaĵojn per E-lingva karto. La celo: bombardi la neesp-istajn kolegojn kaj en tia delikata maniero alvoki ilian atenton al la signifo de la internacia lingvo. Oni nepre signu, ke la represaĵpeta teksto estas E-lingva. Multajn sukcesojn!

En SENNACIULO (1971, 2) *Ch. Hudelot* artikolas pri la politiko en Kanado: tre detale kaj preskaŭ marxisme li analizas la tiean situacion (kial li uzas la formon „Kanadio", kontraŭ-zamenhofan kaj kontraŭ-PIV-an?). Li raportas, ke en la „General-Motors"-striko la usonaj laboristoj strikĉesige rompis sian solidarecon kun la plu-strikantaj Kanadaj kamaradoj kaj atribuas tion al la manko de sennacieca konscio. Pli ĝuste estus paroli pri manko de internacia klaskonscio; la aŭtoro ja mem emfazas, ke en Usono la proletaro ne estas politike edukita. Notindaj estas liaj rimarkoj pri la „faŝista milita leĝo" en Kanado kaj pri la minaco de faŝismo en Usono, montrantaj en stranga lumo la „libe-

ran mondon". — En la rubriko „Ĉies opinioj" *Skeldido,* multeskriba apologiisto (eble senkonscia?) de la solidareco inter proletaro kaj kapitalo, estas nomata „falsa naivulo" kaj tradrašata (de *Kribo).* — En la marta numero la artikolo pri la difektado de la naturo estas leginda.

INFORMADO EL VJETNAMIO denuncas la krimojn de la imperiistoj, kies aviadiloj, en sia krucmilito kontraŭ la sendiaj komunistoj, detruis 475 katolikajn preĝejojn. Krome ĝi konigas la rezolucion de la konferenco de scienculoj, tenita en Orsay (Parizo), kontraŭ la kemia milito de Usono. Mi citas nur jenon: „La amplekseco de la homaj perdoj, la ĉiuspecaj atencoj al la naturo permesas konkludi, ke oni sin trovas vid-alvide al *genocido* duobligita per *biocido*" (gent- kaj viv-ekstermo). Jes, la Pentagono eble revas pri Hindoĉinio, kie troviĝos tri postvivantoj: la trio Ky, Thieu, Khiem, dum la cetera loĝantaro ĝuos la eternan Pacon Amerikanan.

En OOMOTO (1970, 11—12) menciindas la belvorta rememoro de *Bérci Darázs* pri *F. Szilágyi* kaj pri liaj meritoj netakseblaj, kaj la artikolo de *J. Hamvai,* Novzelando, pri la maoria kulturo.

En HEROLDO DE ESPERANTO (Nro 1501) la gazetfondinto *Teo Jung* en sia jubilea artikolo deziras aŭ prirevas kunlaboron inter esp-istoj kaj la adeptoj de diversaj planlingvaj projektoj. La espistoj devus pli *teorii* pri la interlingvistiko, la planlingvanoj devus *praktike* apogi E-on. Se ĉi lastaj ne konsentos pri tio, almenaŭ la espistoj *teoriu,* „prenante per tio la venton el la veloj" de la planistoj. Hm. Jen tikla afero! Kiuj teoriu kaj kiel? Ĉu sekreta societo, ia nova L.A.R., kabinete? Tio malhelpus la praktikan elprovon de la teoriumaĵoj. Ĉu la Akademio mem publike? Tio repuŝus E-on en la situacion antaŭan al la prireforma voĉdono en 1894. Krome, kiuj estus la teoriaj kriterioj de la celata pliperfekteco aŭ kiel-eble-plej-taŭgeco? Mil kaj unu en mil kaj unu kapoj! Ni prenu nur unu ekzemplon. Duonsimpatizanto de E-o skribis, ke lin, kiel latinscienculon, ĝenas la nekutimaj gramatikaj formoj, ekz-e a-finaĵa adjektivo apud o-finaĵa substantivo. Probable tian saman ĝenon sentis ankaŭ *de Wahl,* tial li metis „e" anst. „o" kaj „i" anst. „a". Sed *Gode* jam sentis tro senkoloraj la tro multajn e-finaĵojn, kaj parte ŝanĝis ilin je „o" kaj „a" sentataj pli naturaj. Kaj anst. „i" li metis „e" sentatan tiel same pli natura. Ekzistas tamen simpla vero: ĉiun lingvon oni devas rigardi tia, kia ĝi estas, kaj ne licas ĝin kritiki laŭ la reguloj de alia lingvo. Tio ĉi validas ankaŭ pri E-o. Cetere, kial do nian duonsimpatizanton ĝenas la E-a *poeto dokta* pli ol la latina *poeta doctus,* kaj la E-a *kampulo nekonata* pli ol la latina *agricola ignotus?*

Dum Via vojaĝo en Hungario certigas Vian komforton

EN STACIDOMOJ
restoracio, bufedo, nutraĵ-pavilono

EN TRAJNOJ
litvagono, restoracivagono, bufedvagono

EN ŜIPOJ
restoracio, bufedo

EN LONGDISTANCAJ AŬTOBUSOJ
bufedo

UTASELLATO

Favorpreze certigas la manĝigadon de turistaj grupoj la Pasaĝerproviza Entrepreno. Informojn donas kaj laŭdezire skribitan informilon sendas la Pasaĝerproviza Entrepreno Budapest V., Veres Pálné u. 24 Telefono: 189-900/160

ESPERANTO-TAGOJ EN LA UNIVERSITATO „EÖTVÖS LÓRÁND"

La Univ. Stud-Rondo de Budapeŝto aranĝis Esperanto-tagojn inter la 25-a kaj 30-a de aprilo. Ĝia unua aranĝajo ĝi estis kaj samtempe jam internacia, ĉar ĝin partoprenis la itala *Valerio Ari* el Milano, redaktoro de „Literatura Foiro", la jugoslava *Jivorad Jevtiĉ,* movada spertulo el Kragujevac, la germana *Detlev Blanke* el GDR, kompetentulo de interlingvistiko, kaj ok poloj, kiujn vidi jam estis revido por pluraj el ni, pasigintaj kelkajn tagojn en Pollando, precipe en la E-a seminario aranĝita en Bygdoszcz, kadre de la Tagoj de Pola-Hungara Amikeco. Sincerdire, iom ni volis konkursi kun la tieaj studentoj, atingi, eble superi la nivelon de ilia aranĝajo, kaj tio ne ŝajnis facila tasko konsidere de la brila sukceso de la Bygdoszcz-aj tagoj.

Konfesende, multaj el ni havis kelkan antaŭtimon ĉe la atendo de la gastoj: ĉu bone kaj flue ni parolos, ĉu la gastoj kontentos pri loĝo, manĝo, programo? Sed post ilia akcepto stacidoma (kompreneble kun floroj), kaj ĉe la interkona vespermanĝo en Restoracio „Esperanto" (kompreneble kun tostoj), ĉio embarasa disĉesis, kreiĝis etoso harmonia, kunforĝiĝis la grupeto.

Lunde, la 26-an, en la Eötvös-klubo, ni aŭskultis interesajn prelegojn de niaj gastoj: *V. Ari, J. Jevtiĉ* kaj *D. Blanke.* Posttagmeze HEA akceptis nin en sia ejo por amika interbabilado ligita kun vingustumo.

Marde okazis E-a prononc-konkurso en la fonetika laboratorio de la Universitato. Posttagmeze sekvis grava parto de la seminario: prezentado, pridiskuto kaj prijuĝo de la alsenditaj konkursaĵoj pri la tri temoj anoncitaj kelkajn monatojn antaŭe: 1. *„Ĉu E-o estas politiko?"* 2. *„Ĉu E-o estas ideologio?"* 3. *„Ĉu Kabe pravis?".* Nemalmultaj estis la konkursaj laboraĵoj, precipe pri la temoj unua kaj tria. La vigla diskuto, pri ili komenciĝinta, ne estis finebla tiutage, restis daŭrigota por merkredo. Vespere pluraj el ni havis la okazon viziti la grandan oldulon *Kálmán Kalocsay* kaj renkonti ankaŭ *Lajos Tárkony,* ĉe li vizitantan. Utilan kaj neforgeseblan horon ni pasigis kun la du aŭtoritatuloj. *V. Ari* faris intervjuon por sia revuo; metiĝis la plej gravaj demandoj de la E-a literaturo.

Merkrede daŭris plu la diskutado pri la konkursaĵoj kaj okupis la tutan tagon, tiom da altnivelaj laboraĵoj prezentiĝis. Nia diskutado pri tiuj problemoj, tiel multe kaj de tiel multaj jam pridiskutataj antaŭe, ne tre povis aldoni ion novan, tamen ĝi estis fruktodona: la anoj de nia grupo ne nur aŭdis, sed kvazaŭ travivis tiujn vivantajn problemojn.

Post tio, vespere, bonvenis kelka „aerumado" de la kapoj per urb-vizitado, cigana muziko, hungara vino kaj danco.

Ĵaude, la plimulto de la seminarianoj ekskursis al Szentendre kaj plaĉe sin distris en tiu pitoreska urbeto. *V. Ari* dume ripetis ital-lingve sian prelegon ĉe la Katedro de la itala lingvo: „Itala literaturo tradukita en E-on". Ĉeestis ankaŭ la katedrestro Prof. *L. Kardos,* taksis favore la prelegon kaj montris sin amiko de E-o.

Niajn studo-tagojn kronis la Kultura Vespero en la Eötvös-klubo, aranĝita kune kun HEA, Pola Kulturo kaj Komitato de Viktimoj de Nazismo. En ties unua parto prezentiĝis la „Oratorio de Auschwitz" altiranta grandan publikon. Post tiu grandefekta, animkapta, artaĵo (pri kiu ni raportas aliloke ankaŭ ni faris nian eblon: la Literatura Podio de la Studrondo, la Forumo de junaj E-Poetoj, la esp-istoj de Esztergom kaj la virina ĥoro „Vivu la muziko".

Vendrede, la gastoj forveturis posttagmeze al Dunaújváros, por partopreni la Junularan E-Renkontiĝon.

Antaŭ la Tagoj ĝojigis nin la evento, ke la profesoro-prezidanto de la Studrondo, d-ro István Szerdahelyi akiris postenon de adjunkto en la Katedro de Ĝenerala Lingvistiko kaj Fonetiko. Tiu grava sukceso, krom ebligi al li pli multan okupiĝon pri E-o, estas de konsiderinda signifo, ĉar li estas ja la unua E-faka instruanto ĉe Universitato.

Zsuzsanna Varga-Haszonits

Korespondi deziras

Jadwiga Lenczewska, Iwno, pta: Kostrzyn Wlkp, pow: Środa Pollando. 19 jara. Muziko, filmo, vojaĝo.

Danuta Wiśniewska (13 jara lernantino), Bobrowniki n. Wista, pow. Lipno, woj. bydgoskie, Pollando, kantoj, bildkartoj, diskoj, vivo de junularo.

József Buchner, Lipianki, pocz. Duninów Nowy pow. gostynin, woj. Warsawskie. Pollando. 19 jara. Pri vivo de junularo kun diverslandanoj, ĉefe hungaraj geamikoj.

István Csalár, Érsekvadkert, Rákóczi út 127. 30 jara oficisto. K. dezirus kun pli multaj korespondkamaradoj.

László Kustán, Brasov, Bd. Gheorgiu Dej 29. Rumanio, 20 jara studento. Kolektas pm., bk., li interesiĝas pri ĉio.

EL LA LETEROJ

Altestimata Sinjoro, ĉefredaktoro! Ĵus traleginte la enkondukan artikolon s. t. „Hungara Vivo estas dekjara", mi aldonas mian voĉon al la gratuloj; rilate vian laboron mi trovas nur laŭdajn vortojn kaj sentas profundan dankemon. De pli ol 10 jaroj mi estas arda simpatianto de Hungario kaj hungaroj, sincere — pli ol simpatianto, mi estas admiranto de la kulturaj, moralaj kaj materialaj valoroj, kiujn via nacio kreis en la daŭro de sia miljara historio kaj en tiu mallonga, tamen plej signifoplena periodo de la socialisma sociordo.

Sed kion tio ĉi havas komunan kun HV? Multon. Sur la paĝoj de via revuo, mi trovas respondojn je multaj miaj demandoj. Mi trovas sur ili kaj perlojn de la hungara literaturo en la traduko de majstro Kalocsay kaj freŝajn perlojn de la plej juna generacio de E-literaturistoj, kiel Vilmos Benczik, ekzemple. Neniu en la mondo de Esperanto superis ĝis nun la eruditecon kaj egan laboremon de Kalocsay. Mi estas granda admiranto de lia talento kaj grandega scio. Ĝojigas min la serioza rilato de la junaj hungaraj esperantistoj al la nacia kulturo kaj al ebloj transponti ĝiajn trezorojn per Esperanto al la ceteraj nacioj kaj popoloj de la mondo. Mi vidas en tiu ĉi tre pozitivan tendencon, kontinuecon de la antaŭmilita agado de la literaturista kaj intelektula grupo da hungaroj, kiuj por ĉiam eniris la esperantistan panteonon kaj akiris por si dankemon kaj rekonon de sia nacio.

Kvankam mi estas redaktoro de la Esperantista Brodkastejo, internacilingva ĉelo de la Pola Radio, mi estas principe kontraŭ revuoj, gazetoj kaj radioprogramoj „nete" esperantistaj. Se E-o estu ponto de unu kulturo al alia, la esperantistaj informiloj estu portantoj de la kulturaj valoroj, kiujn unu nacio deziras peri informe por alia, aliaj . . .

Des pli ĝoje mi salutas la iniciatemon de hungaroj! Mi legis la laste eldonitajn librojn. Ili estas bonegaj . . . Sed ni revenu al la ĉefa temo, via revuo. Ĝi aperas tro malofte! Sed tio ĉi ja ne dependas nur de vi mem. Mi pensas, ke vi lerte kombinas la esperantistajn temojn kun la ĉefa kaj plej grava fluo, kiu estas la hungara kulturo, politiko, ekonomio, sporto, eĉ ĉiutagaĵoj.

Akceptu miajn plej korajn dezirojn por la tuta redaktantaro de la „Hungara Vivo". Cent jarojn ĝi vivu!! Red. Mariusz Konrad DASTYCH, Pola Radio, Esperanto-Redakcio, Warsawa-1 Poŝtkesto 46. Pollando.

Antaŭ dulingva aŭskultantaro

Nia diligenta kolego, *Dezső Koncz*, dufoje staris antaŭ granda publiko. La l-an de marto en la Hungara Radio li parolis kvaronhoron pri E-o, poste sian poemon, kiun antaŭe deklamis hungare la eminenta aktoro *S. Pécsi*, li mem recitis E-e. Mikrofono resonas nek plaĉon, nek malplaĉon, sed post ĉi tiu dissendo multaj ne-esp-istoj kaj esp-istoj diradis unu al alia: „Ĉu vi aŭdis lunde tiujn interesaĵojn, kiujn iu diris pri „tiu", respektive pri „nia" Esperanto?" — La 16-an de aprilo, en la bela salono de la Patriota Fronto en Buda, proks. centpersona publiko, duone esp-istoj, duone ne, povis aŭdi pri la vasta literatura agado de *Dezső Koncz* kaj lin longe aplaŭdi. La eminenta psikologo *I. Harsányi* hungare kaj la E-a leksikografo *A. Pechán* dulingve konigis, kiel iam la studento de Sárospatak ekiris trovi vojon al Parnaso, kiel ampleksiĝis lia literatura agado, kiel li ĵurnalistis, redaktis gazeton, sukcesis per pluraj teatraĵoj, aperigis hungare tri versvolumojn, komponis plurajn lande konatajn kantojn popoleskajn kaj kiel fine li dediĉis sin al E-a poezio traduka kaj orginala. Pecojn el ĉi tiu poezio bonege prezentis dulingve fraŭlinoj *K. Nyitray, M. Szabó* kaj s-ro *G. Szondy*. Popolkantojn esperantigitajn de Koncz kantis brilsukcese la landfama popolkantisto *Ferenc Béres* kun piana akompano de s-ro *Endre Szabó*. Li prezentis ankaŭ tiajn, de jardekoj vaste konatajn, popoleskajn kantojn, pri kiuj la ĉeestantoj ne sciis ĝis nun, ke ili devenas de D. Koncz. Bele ornamis la programon la E-aj kantoj de la virina ĥoro: „Vivu la muziko", direktata de *Rita Barabás*.

Jen — oni povas kaj devas trovi la vojon al la mondo eksteresperantista diskonige kaj utiligeble ankaŭ de „samideanaj" rondoj.

A. Pechán

NAJBARECO, AMIKECO

Rumanio

En la Ortodoksa Eklezio oni kutimas en la unua tago de Pasko legi la Evangelion en pluraj lingvoj: greke, latine, hebree, slavone, ruse, france, germane, angle, arabe, Esperante kaj denove rumane.

Sacerdoto Stefan Mazare jam la trian jaron legis ĝin en Esperanto. Multaj esperantistoj partoprenis kaj amaso de kredantoj, kiuj admiris la belsonan lingvon, esprimis deziron eklerni ĝin, petante informojn pri ties ebleco.

(Prof. Nicolae Bulencea, Bucuresti.)

Ĉehoslovakio

La ĉehoslovaka kunlaboro fariĝas pli kaj pli intensa sur ĉiu teritorio de la kultura vivo. La popolteatro de Gottwaldov ĵus prezentis la komedion „Liliofilo" verkitan antaŭ pli ol cent jaroj de *Ede Szigligeti;* la stranga nomo de la titol-rolulo kaŝas migrantan aktoron. La Vinohrady-a teatro de Prago antaŭ plenaj scenejoj ludas la komedion „Dissendo-paneo" de *Károly Szakonyi*. Same en Prago, ankoraŭ ĉi-jare prezentiĝos la „Lenin-Oratorio" de *László Gyurkó* kaj „Ge-Tótoj" komikotragedio de *István Örkény*.

La perspektivoj de la veter-fabrikado

De kelka tempo la vetero estas pli kaprica ol antaŭlonge. Ĉio estas pro tio, ke ni ne sufiĉe regas la naturon. Se nia venko super la naturo estus plena, tiam ni, homoj, ne devus suferi de ĝi. Tiaokaze tondrus, fulmus, frostus kaj degelus tiam, kiam plaĉus al ni, kaj ne al la naturo.

Ĉar la nuntempo ne kontentigas niajn tiaspecajn dezirojn, ni estas devigataj lokumi ilin en la estonton. Do, la scenejo estas en la estonto. Ni regas kaj direktas jam la naturon. Ne ekzistas plu la indigniga situacio, ke hodiaŭ estas belega, printempa vetero, sed morgaŭ oni devas hejti. Tiaj kapricoj ekzistis nur en la pasinteco. En la imaga futuro la meteorologoj direktos la veteron kaj ne kontraŭe. Sed — ankaŭ la meteorologoj, la scienculoj estas diferencaj inter si. Kelkaj el ili ŝatas la varmegon, hundsezonon, aliaj preferas la skiadon, la neĝpilkludon. Kelkaj scienculoj amas naĝi, aliaj amas glitkuri.

Ekzistos meteorologoj, kiuj kantos: „Nur printempo ja venu neniam!..." — kaj penados kuiraĉi vintron en siaj laboratorioj. Pro tio la printempfrakciuloj anoncos sanktan militon kontraŭ la vintrofabrikistoj. Kaj tiel komenciĝos terura meteorologia milito inter la du partioj.

Laŭ la ŝanĝiĝinta stato de la milito, depende de la provizora venko de unu aŭ de alia, jen frostos, jen iĝos varme — jen helos, jen malhelos la vetero. Tondros, plovos, fulmos, brilos, trilos, floros, vintros, printempos, ktp.

Tiel same, kiel tiutempe, kiam ankoraŭ la homaro ne subjugis la naturon, kiam ni ankoraŭ ne estis la estroj de la sovaĝaj fortoj de la naturo.

György Szondi

Hungara dramfestivalo en Sovetunio La Malgranda Teatro en Moskvo prezentis la Ravinon

La Malgranda Teatro en Moskvo kun granda sukceso prezentis de *József Darvas* la dramon „Ravino". La teatro per ĉi tio preparis sin por la Sovetunia festivalo de hungaraj teatraj verkoj, dum kiu 62 teatroj prezentos 19 hungarajn teatraĵojn.

El la vidpunkto de la sukceskonkero de la hungara dramo en Sovetunio, la sovetaj teatraj fakuloj rigardas la festivalon eksterordinare signifa, samtempe ili emfazas, ke ĝi estas nur komenca paŝo, servanta por tio, ke la malkovritaj kaj ekkonitaj dramaj verkoj, senĉese plimultiĝante per novaj, daŭre firmiĝu sur la sovetaj scenejoj.

En aprilo okazis la ferma semajno de la festivalo. Ĉe la prezentadoj okazas antaŭa ĵuriado. La premiojn de la plej bona reĝisorado, de la plej eminenta aktora ludo kaj de la plej sukcesa planado de scenejdekoracio la ĵurio solene distribuos post la Moskva prezentado de la plej enimentaj verkoj.

SLIPARA VORTARO

Ĉefredaktoro *Rüdiger Eichholz.* Eld.: *Esperanto* Press, Port Credit, Ont., Kanado. Prezo de unu serio (3 x 144 slipoj trikoloraj) 0,90 dol.

Dum nia movado kaj literaturo admirinde riĉigis nian lingvon per belarta vorto- kaj esprimotrezoro, ni neglektis kaj nesufiĉe flegis la tiom gravan teknikan-sciencan vortprovizon. Kvankam multaj fakvortaretoj aperis, nekontesteble necesas (eĉ ĝuste tial) konformigi la diversmaniere uzitajn terminojn kaj enkonduki novajn por la amase naskiĝantaj modernaj nocioj. *La venonto de Esperanto dependos sendube grave de ĝia uzebleco en nia rapide evoluanta kulturo, kies pezocentro ŝoviĝas pli kaj pli al la natursciencoj, al la teknika civilizacio.*

La fakterminologiaj komisionoj, organizitaj de *inĝ. R. Haferkorn,* la multmerita eksdirektoro de la Akademia Sekcio por Teknikaj Vortaroj, faris jam diligentan laboron por modernigi, evoluigi la nomenklaturojn, kaj — neniam facila devo — elimini la arkaikaĵojn aŭ malkorektaĵojn de la ekzistantaj vortaroj. Tia laboro estas ĉiam bezonata ĉe viva lingvo kiel la nia; tamen la Esperanto-leksikologion igas komplika la konata fakto, ke la terminoj, ties sencoj, krome ilia evoluo malsamas en diversaj landoj. Estas dezirinde, ke la sama termino estu uzata por la sama nocio, ankaŭ por eviti malagrablan miskomprenon, sekve iaspeca internacia kunlaboro, demokratia kontrolo kaj revizio ŝajnas necesaj por adekvate internaciigi la fakterminojn.

Tiukampe Rüdiger Eichholz plenumas bravan laboron. Li klopodas per vasta internacia kunlaboro, instigante multajn fakulojn, atingi la plej kontentigajn solvojn de la multspecaj fakterminaj problemoj. Kun inĝ. Haferkorn (nun jam kun lia posteulo, *inĝ. A. Broise)* li publikigas en ĉi tiu daŭrigebla novtipa vortaro multajn terminojn, kiuj ne troviĝas en PIV, sed ankaŭ multajn tie troveblajn, por provizi ilin per pli sciencaj difinoj. Do la tuto estas kvazaŭ *faka suplemento* de la grandaj vortaroj. Alte taksinda estas la zorgema redaktado de la jam aperintaj *tri serioj kaj aparta fakserio* de kemi-fiziko. La esplorantan fakulon preskaŭ ravas la laŭdinda pedanteco, per kiu ĉiu detalo estas preparita, tiom ke la verkaĵo jam pli kaj pli fariĝas speco de enciklopedio. Krom precizaj difinoj, aldonaj klarigoj kaj nacilingvaj tradukoj, plurfoje ankaŭ desegnoj indikas la temon. La sliparo akordiĝas kun la *Esp. Bildvortaro,* redaktita de R. Eichholz, kiu estas traduko de la fama Duden-bildvortaro germana, aperinta jam en multaj aliaj lingvoj, kaj ankaŭ tre grava el faklingvista vidpunkto; ili reciproke sin kompletigas. Kaj fakuloj, kaj aliaj ŝatantoj de nia lingvo povas plezure foliumadi la slipojn, trovante ofte tre interesajn, eĉ spritajn solvojn laŭ moderna lingvouzo. Estu menciate per iom da kontento, ke inter la indikitaj fontoj ne malofte troviĝas hungaroj (S. Szathmáry, k.a.).

Ervin FENYVESI

Libero kaj amo

Pasintjare aperis elektitaj poemoj de la ĝis nun plej granda hungara poeto Sándor Petőfi (1823—1849).



En 1 horizontala kaj 1. vertikala vi trovas sinkonfeson kaj samtempe aŭguradon kaj sorton de la poeto. Sendu al ni tiujn versojn. Inter solvintoj ni lotumos premiojn.

Horizontalaj vicoj: 12. Japana poeto esperantista, pacbatalanto, aŭtoro de „Verda Parnaso". 13. Prepozicio. 14. Iom el la tuto. 15. Tia drogo kaŭzas anestezon. 17. Grasa likvaĵo uzata en nutrado, medicino, industrio ktp. 19. Parto de teatraĵo sen la komenco. 20. Kemia simbolo de osmio. 21. Rivero — hispane, aŭ kun la komenco de 19.: kanto en teatraĵo. 22. Disĉiplo de Kristo, aŭ kun artikolo: poemo de Sándor Petőfi. Aperis ankaŭ en poemaro „Libero kaj amo". 23. Valora metalo. 25. Duono de loko! 26. Multnombra, ĝenerale senorda kolekto. 27. Disrompi terbulojn. 29. Pek' kontraŭ la geedzeca fideleco. 30. Urbo en norda parto de Italio (mankas la fino). 31. Parenc' de kuniklo. 33. Malbona antaŭsigno. 35. . . .-io: nomo de granda duoninsulo Eŭropa. 36. Lancisto. 37. Identaj konsonantoj. 38. Maljusta, perforta alproprig'. 40. Persona pronomo nedifinita. 41. . . . kanto: kanto por dormigi infanon. 42. Inverse: interjekcio. 44. Post la unua sekvas la . . . 46. . . . morgano: miraĝo. 47. Sciigi oficiale. 50. Mezepoka tortura ekzekut'. 51. Inverse: membro. 52. Parto de Atlantika Oceano inter Eŭropa kontinento kaj Britaj Insuloj.

Vertikalaj vicoj: 2. Eŭropa lando. 3. Legomo el fam, liliacoj (allium porum). 4. El ili konsistas skeleto. 5. Miksate: ora. 6. MB. 7. Nedifinitan personon. 8. Brand' eltirita el rizo. 9. Ĉefa arterio. 10. Sufikso, montranta kolektivecon (kun substantiva finaĵo). 11. Bildo farita per optika aparato kaj kemiaĵoj. 16. Loĝanto de Azia lando. 18. Juvelŝton' el blanka aŭ blueta siliko kun ŝanĝkoloraj rebriloj. 22. Rivero en Orient-Azio, 4500 km-ojn longa. 24. Regula aranĝo da aferoj. 26. Amegado. 28. Itala river'. 29. Ekmontriĝ'. 30. Streĉi siajn fortojn por atingi rezultaton. 32. EB. 34. Parto de homa korpo. 37. Estonteco. 39. Skota poeto (1759—1796, Robert . . .). 41. La sinjorin (artikolo kaj radiko). 43. Senutile, sen rezultato. 45. Plej malgranda, fizike nedividebla er' de materio. 46. Tre konata. 48. Duop'. 49. Moviĝi de iu loko al alia. 50. Amfibia vertebrula saltanta best' el familio, de senvostuloj. 53. Prep. por kvantoj.

La solvo de la krucvortenigmo, aperinta en HV No. 1/1971: Literatura Mondo — De paĝo al paĝo — EMBA — Reĝo Lear — Sonĝe sub pomarbo; La vagabondo kantas — Tagore — Antologioj — Madách I. — Norda Vento — Originala novelaro — Eroŝenko — Ĉielarko — Waringhien.

El la solvintoj gajnis libropremion: Richard Tammik, Hulja, Rakvere, Estonio, USSR; Zsigmond Bíró, Paszab, Tanácsköztársaság u. 10, Hungario; P.V. Bagger, Uglebakken 22, Jyllingve DK. 4000, Roskilde, Danlando.

Ĝustan solvon ensendis ankoraŭ: f-ino N. Hanson, el Anglujo; Otto Kuttelwascher, el Aŭstrio; Aleŝ Bednarik, Barta Frantiŝek, Miroslav Hromas kaj Eduard V. Travozek, el Ĉehoslovakio; H. Monrad Christensen, el Danlando; Rainer Fischer, Jürgen Hamann, s-ino Linde Knöschkle, Ernst Mutschall kaj d-ro Karl Schulze, el Germana Demokratia Respubliko; Erika Bardocz, Bp.; Pál Béres; Lenke Bíró, Ibrány; Lászlóné Bognár, Győr; Ferenc Egry; István Eöry, Győr; János Kiss, Kapolcs; István Kovács, Oroszlány; Zsigmondné Kovács; Lenke Kun, Szeged; Mária Leczkési, Békés; József Lőrinczi, Miskolc; Károly Magyari, Marcali; István Mészáros, Kölesd, el Hungario; Ueyama Masao, el Japanio; Maria Grochowska, Bialistok; kaj Roman Wiktor Rutkowski, el Pollando; Viktoro Arolovič, Moskvo; Nikolao M. Fedotov, Novoĉerkask; Rein Kiviaru, Estonio; Barbara Vereŝĉagina, Novosibirk, el Sovetunio; Gunnar Birgersson, Tomas Jansson kaj Hugo Löfgven, el Svedlando, Zdenek Hrŝel, Adolf Stanura, Marie Bartocska el Ĉehoslovakio. Franz Peter Kurtz, D-ro Martin Schüler el G. D. R. — Ni gratulas al ĉiuj!

Bonan amuziĝon per nia nuna krucvortenigmo!

FERI

Interparolo kun Alina Nowak, verkistino pola-esperanta

Emociite de la „Oratorio de Auschwitz" (Oratorium Oswiecimskie), prezentita la 29-an de aprilo en la aranĝo de HEA, Pola Kulturo kaj Komitato de Viktimoj de Nazismo, mi serĉis okazon paroli kun la aŭtorino, verkanta dulingve: pole kaj E-e. Akirinte ŝian afablan permeson raporti pri la intervjuo, mi demandis ŝin pri la motivoj ŝin instigintaj krei tiun verkon.

— Vidu, sinjoro, min turmentis, obsedis, hantis neforskueble la problemo de la genocido: apliko de scienco, tekniko kaj organizo plej modernaj por amasa, industria mortigado de homoj. Morto de unu homo, de dek, de cent, de mil homoj — al ĉi tio bedaŭrinde kutimigadis nin la historio. Sed kia homa imago povas koncepti la murdon de kvar milionoj da senkulpuloj nur en unu koncentrejo: Auschwitz-Birkenau?

— *Mi supozas, ke via Oratorio estas ĝuste provo respondi la demandon, kiel tio povis okazi?*

— Jes, certe. Alie ne naskiĝus la verko. Sed mia plej esenca intenco estis: elvoki tiun demandon el la spektantoj. Kompletan respondon apenaŭ ni trovos. Sed la devo estas meti tiun demandon ĉiam ree kaj ree. Eble per tio ni formos digon kontraŭ la ripetiĝo de tiaj krimoj ie ajn kaj iam ajn.

Verkante la Oratorion, mian atenton dekomence mi koncentris al okazaĵo min skuinta plej profunde: laŭ la atesto de la akuŝistino Leszczinska, ekskaptitino de Auschwitz, oni pereigis trimil suĉinfanojn naskitajn en tiu mortotendaro. Ĝis la majo de 1943 oni tuj sufokis en barelo da akvo ĉiujn ĵusnaskitojn; de tiam oni „donacis" al ili la vivon, t. e. la malsatmorton. La Oratorio volas esti ne nur omaĝo al tiuj viktimoj, sed ankaŭ averto kaj akuzo. La emo forgesi estas natura eco de la homa animo. Sed tiujn aferojn oni ne rajtas forgesi, ĉar la forgeso estus fakte formo de akcepto.

Permesu al mi, Sinjorino, demandon personan? Ĉu eble vi estas unu el la 30 infanoj savitaj el la infero de Auschwitz?

— Ne! En tiu hida tragedio mi ne partoprenis en la fizika senco, sed per sentoj kaj imago mi estas kun la viktimoj ĉie kaj en ĉiu tago, monato kaj jaro.

— *Ĉu per la elverko de via Oratorio, vi, Sinjorino, liberiĝis de la obseda ŝarĝo de tiu masakro?*

— Se paroli sincere, tute ne. Sed mi sentas, ke mi plenumis parteton de devo koncerne la viktimojn de la hitlerejoj, koncerne mian nacion kaj ankaŭ koncerne la nacion germanan. Sed nur parteton de devo; tial mi verkas plu samtendence. Mia televida monodramo „Ŝanco", verkita ankaŭ E-e, estas protesto kontraŭ la rasismo. Mi volus, ke ĝi, al kiu mi estas forte ligita, plenumu similan rolon kiel la Oratorio. Ankaŭ miaj pluaj planoj montras en la saman direkton.

— *Grandega tasko devis esti por vi, Sinjorino, trovi por via Oratorio la adekvatan formon: harmonian kunigon de prozo kun poezio, de aŭtentaj dokumentoj kun moderna formo de arta kanto.*

— La formon kvazaŭ altrudis la temo. Mi reiris al la severformaj komencoj de la greka tragedio. Mi pensas tamen, ke la Oratorio atingas sian artan efekton grandparte dank' al la moderigita, profunde homa, vere grandeca rolado de du aktorinoj kaj al la muziko reliefiganta ĉiujn ideojn de la teksto.

— *Permesu, S-rino, emfazi, kiel apartan signifon por ni, esp-istoj, havas tio, ke la plejparton de viaj kreaĵoj vi verkas samtempe en la pola lingvo kaj en E-o. Mi dankas vin nome de la redakcio kaj de niaj legantoj por la agrabla kaj interesa intervjuo.*

— Ankaŭ mi esprimas mian dankon, kaj, uzante la okazon, mi salutas tre kore ĉiujn E-ajn geamikojn, la legantojn de via revuo.

J. Kerek

HUNGARA VIVO

Kvaronjara revuo de Hungara Esperanto-Asocio
Budapest VIII., Kenyérmező utca 6.

1971. XI-a jaro, 3-a numero

Ĉefredaktoro: *Mihály Gergely*
Responda redaktoro: *d-ro Jozefo Mátéffy*
Lingva revizio: *K. Kalocsay*
Arta redaktoro: *Jozefo Szekeres*

Redaktoraro:
d-ro Pál Avar, d-ro István Bácskai, Szilárd Bálint, Vilmos Benczik, Ada Csíszár, Ervin Fenyvesi, Zsolt Gyarmathy, Lajos Lesznai, Alfonso Pechan, Aurél Ponori Thewrewk, Mária Szabó, d-ro István Szerdahelyi, Tibor Újlaky-Nagy, Gábor Vigh

Ĉefkunlaborantoj:
D-ro Géza Bárczi, Paŭlo Balkányi, Károly Jobbágy, Mór Korach, Ludoviko Kökény, Sándor Szathmári, Lajos Tárkony

La redakta komitato la unuan ĵaŭdon de ĉiu monato posttagmeze de la tria ĝis la kvina horo havas akceptotagon. (Bp. VIII., Kenyérmező utca 6.)

Eldonas: „Népszava" Gazeteldona Entrepreno, Budapest, VII., Rákóczi út 54.
Telefono: 224-819

Responda eldonisto: Márton Gábor direktoro
Disvastigas la Hungara Poŝto. Abonebla en ĉiuj poŝtoficejoj, ĉe la gazetkolportistoj de la Centra Gazetoficejo de la Poŝto (K. H. I., Budapest, V., József nádor tér 1.) senpere, aŭ per ĉekenpagilo, por individuaj abonantoj la ĉeknumero estas 61 280, por neindividuaj 61 066.

La abono estas por jaro Ft 32.—, al eksterlando krome Ft 6.40 poŝtelspezo.

71.5888 Békés megyei Nyomdaipari Vállalat, Gyula
Indexszám: 25.377

medimpex

Hungara Eksterlandkomerca Entrepreno pri Farmaciaj Produktaĵoj

Budapest, 5 ● Poŝtkesto 126

EKSPORTAS-IMPORTAS

Farmaciaj specialaĵoj ● Farmaciaj bazmaterialoj ● Vakcinoj por hom- kaj best-terapeŭtikaj celoj ● Veterinaraj drogoj ● Furaĝaldonaĵoj ● Laboratoriaj kemiaĵoj ● Biokemiaj produktaĵoj ● Radioaktivaj produktaĵoj ● Volatilaj oleoj ● Kuracplantoj ● Resanigaj kaj amaraj akvoj



LA EMBLEMO GARANTIAS LA KVALITON!

Fabrikas
modernajn,
longe daŭrajn meblojn

LIGNOINDUSTRIA KOOPERATIVO EN PÉCS

HUNGARIO

PÉCSI FAIPARI KTSZ